

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

17-a jaro

N-ro 10 (192)
Oktobero 1953

CENTRA OFICEJO
de la
**UNIVERSALA
LIGO**

Riouwstraat 172
DEN HAAG
Nederlando
Poŝtkonto 408826
Tel. 556677

MAURITS DEKKER

aŭtoro de „La mondo ne havas atendejon”

Maurits Dekker, nederlanda aŭtoro de dek-naŭ romanoj, naŭ teatraĵoj kaj nombro da noveloj, estas majstro en la priskribo de la tragedio, rezultanta el la kolizio de animplena laboro kaj senanima tekniko. Li naskiĝis en la jaro 1896 en Amsterdam, la urbo, kiun li amas per sia tuta animo. En unu el siaj romanoj, titolita „Amsterdam”, li lirike pentras la belecojn de la amata urbo: la ĉarmon de ĝiaj kanaloj, la siluetojn de ĝiaj preĝejoj, la foliarojn de pli ol centjaraj arboj, k.t.p. Li diras interalie: „Italujo kaj la Riviero havas sian sunon, la akrajn, helajn kolorojn; Londono havas sian nebulojn; Parizo sian specialan klarĉeĉon, sed Amsterdamo havas sian opalan lumon, kiu apartenas al ĝi kaj pensigas min al arĝenta kardo antaŭ velura, pura kurteno. Mi ne povas diri, ke



Maurits Dekker

urbo estas pli bela ol aliaj urboj, sed mi scias, ke Amsterdamo havas sian propran belecon, propran atmosferon, ne similan al tiu de iu ajn alia urbo.”

Maurits Dekker estas revanto kaj samtempe granda realisto. Li akre protestas kontraŭ homa krueleco kaj bruteco. Li estas seniluziiginta idealisto. Feliĉe, lia sento por bonhumoro korektas lian pesimismon.


La vivo ne dorlotis lin. Li naskiĝis en malriĉaj cirkonstancoj. Jam tre june li devis forlasi la lernejon por helpi en la subtenado de la familio. Li okupis ĉiajn oficojn: de magazena komizo, oficisto, hejtisto, forĝisto, pentristo, muntisto, komerca vojaĝisto, varietea artisto, ĵurnalisto, gvidisto, kolportisto, libristo, k.t.p. Kaj dume

li verkis, verkadis, ofte en plej malfavoraj cirkonstancoj, ĝis fine lia talento estis

la Praktiko

LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Aperas monate. - Abonprezo: laŭvola, sed minimume 24.— Steloj (6.— nederlandaj guldenoj) por unu jaro. — Al la Aktivaj Membroj de la Universala Ligo senpaga. - Reklam-tarifo: 1 paĝo 600.—, 1/2 paĝo 360.—, 1/4 paĝo 200.—, 1/8 paĝo 100.—, 1/16 paĝo 50.—, 1/32 paĝo 25.—



Sceno el la prezentado de „La mondo ne havas atendejon”. — En la laboratorio de la atombomb-fabrika. La personoj, de maldekstre: Doktorino Mary Holmes, kemiistino (s-ino Ans v. d. Walv. Straaten); D-ro James Thomson, inĝeniero (Ko Verwey); Inĝeniero George Benner (Kees Buys).

rekonata kaj kun la elmeritata atento honorata.

En la lasta libro, kiun li verkis antaŭ la mondmilito, li pasie batalas kontraŭ la antisemitismo. Ĉi tiu libro estis la unua, kiu estis malpermesata dum la germana okupado. Mem estante judo, li devis kaŝi sin dum la militaj jaroj. Sed li daŭrigis verki broŝurojn kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la hitlerismo, kaj la unua impona romano pri la okazaĵoj dum la milito, estis de lia mano.

En sia lasta teatraĵo „La mondo ne havas atendejon” li priskribas la internan konflikton de juna inĝeniero, filo de fama profesoro, kiu kune kun sia patro eksperimentas por

eltrovi novan materion uzeblan por la fabrikado de bomboj, pli fortaj kaj pli detruaj ol la ekzistantaj atombomboj. Pri la ideo verki ĉi tiun dramon, li mem donis iam la jenan klarigon:

„Post Hiroŝima la atombombo okupis miajn pensojn, sed nur poste, leginte la raportojn pri Japanujo kaj Bikini, kaj la publikigaĵojn de la usonaj kompetentuloj, mi ricevis pli da kompreno pri la ĝenerale homa flanko de ĉi tiu problemo, kaj maturiĝis en mi la intenco verki pri ĝi. Ŝajnis al mi, ke la plej taŭga formo estus teatraĵo, ne nur pro tio, ke ĉi tiu temo estas ŝarĝita per drameca konfliktaĵo, sed ankaŭ, ĉar de la scenejo la homo povas rekte kaj vive turni sin al la homo. Mi opinias, ke la arto devas plenumi ankaŭ socian mision kaj ke la dramo en ĉi tiu problemplena tempo sendube staras antaŭ la tasko artisme kunfrunti la rigardanton kun la medio, en kiu li vivas.”

En Nederlando okazis jam 350 prezentadoj de ĉi tiu dramo. El la nederlanda lingvo ĝi estas tradukita en la svedan, danan kaj germanan lingvojn, kaj ankaŭ en la novhebrea lingvon de la ŝtato Izraelo, kaj prezentita en la koncernaj landoj, ĉiam de profesiaj aktoroj. En Bulgarujo, Finnlando kaj Grekujo amatoroj ludis ĝin en la naciaj lingvoj de tiuj landoj.

La publiko kaj la kritiko akceptis la dramon ĉie kun multa simpatio kaj laŭdo. La nederlanda gazetaro nomis ĝin „bona kaj nobla dramo” (*Haagsche Courant*), „triumfo por la nederlanda scenejo” (*Vrij Nederland*), „grandioza teatraĵo” (*Het Vrije Volk*) k.t.p.

„La mondo ne havas atendejon” estis jam prezentata ankaŭ en Esperanto, en la traduko de F. Faulhaber. La amatora teatra grupo „La Verda Masko” (Hago) ludis ĝin la 5-an de aprilo en Hago, kaj laste, la 28-an de septembro, en Rotterdam, en la teatro „De Lantaarn” (La Lanterno), antaŭ plena salono.



OFICIALAJ KOMUNIKOJ DE LA UNIVERSALA LIGO

375. — JARKUNVENO 1953. — La ĝenerala membrokunveno de UL en la jaro 1953 okazis la 26-an de septembro posttagmeze en la konferencujo „Woudschoten” apud Zeist (Nederlando), en la kadro de la aŭtuna konferenco de la Nederlanda Mondfederalista Movado. Prezidis la liga vicprezidantino s-ino Julia Isbrucker, ĉeestis la estraranoj A. Cseh, D. M. Ponti, H. M. Vermaas kaj H. E. L. Voitus van Hamme, plue kelkdek aktivaj membroj de UL el diversaj urboj de Nederlando. La prezidantino, malferminte la kunvenon, esprimis sian ĝojon pro la renkonto en tiel bela kaj agrabla kunvenloko kaj pro la fakto, ke en la kadro de la mondofederalista konferenco partoprenas tiel multe da esperantistoj.

Envenis saluttelegramo de la Brita UL-Komitato, plue leteroj de: s-ro D. Dalmau, kiu priskribas la situacion koncerne al Esperanto kaj UL en Hispanujo; de s-ro L. Sinha, kiu estis invitita por prelegi en ĉi tiu konferenco, sed pro siaj taskoj en la servo de la Unesko devis resti en Svedujo; de s-ro Saldanha Carreira kun raporteto pri la situacio en Portugalujo; de s-ro B. Backer en la nomo de pluraj UL-anoj en Zaandam; de s-ro M. Guyot el Belgujo; de s-ro Graversen, reprezentanto de UL por Danujo, pri la malfacileco labori efike por UL, ĉar ĝi ŝajnas esti kvazaŭ konkurenca al la forta mondofederalista movado en Danujo. En kunligo kun ĉi tiu letero la prezidantino faris mencion pri la rezolucio por Esperanto, ĵus akceptita en la Mondfederalista Mondkongreso en Kopenhago, kaj konsilis, ke la danaj

UL-anoj klopodu influi sian landan mondofederalistan organizadon en la senco de la akceptita kongresa rezolucio.

La protokolo de la antaŭa jarkunveno, okazinta en Oslo, estis laŭtlegata kaj aprobata. Post tio la liga sekretario A. Cseh prezentis kaj komentis la sekretarian raporton. Li resumis la ĉefajn okazintaĵojn de la lasta jaro, pri kiuj jam aperis detalaj raportoj en la Ofic. Komunikoj kaj en apartaj artikoloj en La Praktiko. Speciale li laŭdis la bonan laboron de la landaj reprezentantoj kaj proponis esprimi al ili publikan dankon. Same al la fervoraj varbantoj, inter kiuj daŭre s-ro J. Moll en Utrecht (Nederlando) estas la unua, nun jam kun 1424 varbitoj. Ĵus, la 17-an de septembro, estis enskribata la 10,000-a membro de UL: s-ro J. Groeneveld en Haarlem (Nederlando). Li kaj lia varbinto, s-ro Moll, ricevis de la liga estraro kiel memoraĵon artan portreteton de D-ro Zamenhof. La kunveno akceptis ĉi tiujn sciigojn kun entuziasma aplaŭdo, same la informon, ke ĝis la tago de la jarkunveno la nombro de la membroj atingis 10,009, tiu de la donacitaj brikoj 102,573.

La liga organo La Praktiko dum la jaro 1952 aperis, inter la limoj de la financaj eblecoj, en 8 kajeroj kun entute 160 paĝoj. Porti la altajn preskostojn estis eble nur dank’ al la donacitaj „aldonaj” brikoj, ĉar la sumo de la aktiva kotizo ne sufiĉas por la publikigo de tia gazeto. Tial danko estas dirata al ĉiuj membroj, kiuj laŭpove donacis brikojn. Pliampleksigo kaj plioftigo de la gazeto dependas de la stato de

la kaso. Rilate al la Almanako la Centra Oficejo atentis la konsilojn de membroj en diversaj landoj, ŝpari per forlaso de la ampleksa kalendara parto kaj prokrasti la aperigon ĝis antaŭ la jarfino, tiel, ke la libreto entenu la adresojn de ĉiuj Aktivaj Membroj de 1953. En ĉi tiu jaro la presigo de la gazeto estis transdonata al alia presejo, kie laboras pluraj esperantistoj, kio ebligas pli facilan kaj pli rapidan laboron.

La financa raporto pri 1952, prezentita de la liga kasisto s-ro inĝ. Voitus van Hamme, kaj jam publikigita en La Praktiko, estis aprobata sen diskuto.

Envenis propono de la Brita Komitato de UL, ke parto de la kotizoj de la membroj en Britujo apartenu al la kaso de la Komitato. Faritaj kalkuloj elmontris, ke tia divido de la enspezoj malebligus la pluan eldonon de la liga gazeto sur la ĝisnuna nivelo. Tial la kunveno ne akceptis la proponon, sed esprimis la esperon, ke en alia formo troviĝos kontentiga solvo. Simila propono de la Sveda Komitato de UL montriĝis akceptebla, ĉar ĝi esence estas egala kun la aranĝo praktikata kun la landaj reprezentantoj.

Por la du vakantaj lokoj en la estraro, pro la laŭstatuta deviga eliro post sesjara periodo de la estraranoj A. Cseh kaj D-ro H. C. Raasveldt, estis proponitaj nur la kvar kandidatoj de la liga estraro: por la unua loko s-roj A. Cseh kaj H. J. Hendriksen, por la dua loko D-ro B. Cosenza kaj D-ro H. C. Raasveldt. El ĉi tiuj la kunveno per sekreta skriba voĉdono elektis s-rojn A. CSEH kaj B. COSENZA (Rio de Janeiro, Brazilo), por ses jaroj.

Ĉar alvenis la tempo de la granda kunveno de la mondofederalista konferenco, la prezidantino fermis la jarkunvenon kun dankvorto al la ĉeestantoj kaj kun instigo partopreni en la kunsidoj de la konferenco. — M. H. Vermaas, vic-sekr.

La geaktoroj havas grandan meriton jam pro tio, ke ili kuraĝis entrepreni la prezentadon de ĉi tiu malfacila peco, kaj ili plenumis grandegan laboron. Kompreneble, oni devas prijuĝi la ludon laŭ alia mezuro, ol ĉe profesiaj geaktoroj, sed ĉiukaze oni povis konstati, ke la geaktoroj kaj la reĝisoro (s-ro L. M. Schüller) brave kaj sukcese plenumis la taskon kaj certe meritis la aplaŭdojn, kiuj abunde tondris ĉe la aktifinoj. Precipe laŭdinda estis la ludo de la ĉefroluloj s-ino Ans v. d. Wal-v. Straaten (en la rolo de doktorino Mary Holmes), s-ro Willem Wagner (profesoro Thomson) kaj s-ro Ko Verwey (la filo de la profesoro). Ankaŭ la aŭtoro, kiu ĉeestis la prezentadon, ricevis varman aplaŭdon.

Estas nur bedaŭrinde, ke la „Verda Masko“ ne sekvis la ĝustan kaj internacie praktikatan elparolon de Esperanto, kiu estas bonege klarigata en la „Plena Gramatiko“ de Kalocsay kaj Waringhien, kaj kiu ne estas malgravaĵo sur la scenejo.

Ĉi tiu teatraĵo, kiu skuas kaj vekas la konsciencon de tiuj scienculoj, kiuj donas sian kunlaboron al la produktado de amas-detruiloj, certe profunde impresas ĉiun, kiu vidis aŭ legis ĝin.

Ke Maurits Dekker, la kuraĝe pensanta kaj sincera homo, estas tutkora favoranto de Esperanto, tio estas memkomprenebla. Li ankoraŭ ne ellernis nian lingvon, — pro tempomanko, laceco kaj riproĉinda maldiligenteco, kiel li mem simpatie konfesas, — sed li uzas ĉiun okazon por pledi por Esperanto, ekzemple en la kongresoj de la internacia PEN-klubo, kies membro li estas, kaj en la gazetaro. Antaŭ kelkaj semajnoj aperis el lia plumo en la revuo „Vrij Nederland“ artikolo kun varma pledo por la enkonduko de Esperanto en la internacia vivo. Sed lia edzino, kiu estas perfekta esperantistino kaj prezidantino de la amsterdama klubo de la nederlanda esperantista unuiĝo „La Estonto



La konflikto inter patro kaj filo. Sceno el „La mondo ne havas atendejon“. La personoj: Profesoro Charles Thomson, atomscienculo (Willem Wagner) kaj lia filo D-ro James Thomson, inĝeniero (Ko Verwey).

Estas Nia“, kun fervora aktiveco partoprenas en la Esperanto-movado en duobligita mezuro, ankaŭ anstataŭ sia edzo.

La personecon de Maurits Dekker kaj lian rolon en la literaturo kaj en la kultura vivo de Nederlando detale kaj per tre kompetenta plumo priskribas la nederlanda verkisto David de Jong en sia 102-paĝa libro „Maurits Dekker, zijn persoon en zijn werk“ (M.D., lia persono kaj lia laboro), aperinta en 1946 ĉe la eldonejo Sijthoff en Leiden.

KION FARAS LA LIGANOJ?

D-ro Wilhelm Herrmann, AM de UL, supera juĝisto ĉe la distrikta tribunalo en Lampertheim (Hessen, Okcident-Germanujo), dum la lasta Germana Esperanto-Kongreso en Frankfurt-am-Main estis elektata kiel prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio.

S-ro C. ten Seldam, AM de UL en Amsterdam (Nederlando), la 16-an de marto doktoriĝis en la Universitato de Utrecht per disertacio titolita „Energies and Polarizabilities of Compressed Atoms“ (Energioj kaj Polarizebloj de Kunpremitaj Atomoj). Al la anglalingva disertacio estas aldonita detala resumo en Esperanto, kaj la klarigaj tekstoj ĉe la ilustraĵoj estas presitaj ankaŭ en Esperanto.

S-ro Olle Olsson, AM de UL en Lund (Svedujo), dum sia partopreno en la Internacia Kongreso de Mondfederalistaj Studentoj en Kopenhago, tre fervore kaj efike laboris por konvinki la junajn mondfederalistojn pri la neceseco de neŭtrala mondlingvo, kaj proponis, ke ili en la diversaj landoj kunlaboru kun la esperantistaj organizaĵoj. La tekstoj de liaj parolado kaj propono estas aldonitaj al la kongresa raporto.

D-ro Johano Hamvai, AM de UL en Auckland (Nov-Zelando), dum la 2—12 de julio gvidis specialan Ĉe-metodan Esperanto-kurson por personoj, kiuj intencas instrui Esperanton en la estonteco per la Ĉe-metodo.

S-ro Hans Steiner, reprezentanto de UL por Aŭstrio, forlasis sian hejmurbon Wörgl (Tirolo) por partopreni en la aŭstria ĉefurbo Vieno trimonatan specialan kurson por financoficistoj.

S-ro Antono Paluzie-Borrell (UL 9386) en Barcelona (Hispanujo), fervora esperantisto kaj eminenta astronomo, bibliotekisto en la Astronoma Societo de Hispanujo kaj Ameriko, ricevis la grandan kaj plene merititan distingon, ke al unu kratero sur la Luno je lia honoro

oni donis la nomon „Paluzie“. Al la esperantistaj meritoj de nia honorinda Ligano apartenas interalie, ke je lia interveno la finna astronomo D-ro Yrjo Väisälä donis al du asteroidoj la nomojn „Esperanto“ kaj „Zamenhof“.

S-ro Tiberio Morariu, AM de UL, la rumandevena eminenta Esperanto-pioniro vivanta en Svedujo, fariĝis redaktoro de la Sveda Esperanto-Gazeto „La Espero“.

S-ro Paul E. Schwerin, reprezentanto de UL por Aŭstralio, gvidas en la urbo Sydney Ĉe-metodan Esperanto-kurson, organizitan de la Esperantista Societo de Sydney.

F-ino Marianne H. Vermaas en Rotterdam (Nederlando), vicsekretariino de UL, dum la Universala Esperanto-Kongreso en Zagreb estis elektata kiel membro de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio.

S-ino E. Burgler-Jezsó, AM de UL en Geleen (Nederlando), redaktorino de la junulara gazeto „La Juna Vivo“, en la unua semajno de aŭgusto gvidis la 9-an kongreson de la Tutmonda Esperantista Junular-Organizo (TEJO) en Wörgl (Tirolo, Aŭstrio). Per sia sindona laborego kaj bonkora helpado ŝi gajnis la dankemon kaj amon de ĉiu partoprenanto de la sukcesplena kongreso.

S-ro Raimundo Menezes, AM de UL en Rio de Janeiro (Brazilo), ĵus finis unujaran ofican restadon en la usona ĉefurbo Vaŝingtono, kaj revojaĝis al sia hejmurbo.

S-ro J. de Saldanha Carreira, reprezentanto de UL por Portugalujo, la senlaca portugala pioniro de mondlingvo kaj mondpaco, inter malfavoraj cirkonstancoj daŭrigas sian heroan batalon por niaj idealoj, fervore organizante ĉiujn esperantistajn fortojn en sia lando, kaj precipe per publikigo de bonegaj propagandaj artikoloj en la portugala gazetaro.



Prof. D-ro Edmond Privat, prezidanto de UL, havis en ĉi tiu jaro gravan, sed senbruan jubileon, ĉar, kiel la „Enciklopedio de Esperanto“ rakontas al ni, en la jaro 1903, do antaŭ kvindek jaroj, li komencis lerni Esperanton, en sia dek-kvara vivjaro. Kiel altvalora, fruktiĉa kaj benoplana estis la daŭrigo de tiu junaĝa komenco, tre bone scias ĉiu esperantisto. Ni agas certe laŭ la intenco de ĉiu, prezentante al nia atestimata kaj amata samideano elkoran gratulon kaj dankon.

LA JARKUNVENO DE UNIVERSALA LIGO

en Woudschoten apud Zeist, 26-27 Septembro 1953.

Kiam la Mondfederalista Movado en Nederlando invitis nian Universalan Ligon al sia aŭtuna konferenco en Woudschoten, la estraro de U.L. tuj decidis okazigi nian jarkunvenon en tiu belega loko.

Mi estas certa, ke neniu partopreninto bedaŭras tiun decidon, ĉar la cirkonstancoj, en kiuj ni kunvenis, ne povis esti pli agrablaj.

Belega, suna vetero favoris nin kaj la dolĉaj odoroj de la ĉirkaŭanta pinarbaro plenigis la tutan domon.

Estis tre feliĉa kombino: Mondfederalistoj kaj Esperantistoj! Ambaŭ havas la saman idealon de unuiĝinta mondo, kaj reciproke ili bezonas unu la alian. La esperantistoj estas preparantaj la bazon de la konstruado de la popoloj, en kiu poste ĉiu popolo povos pace labori, sen timo pro ĉiondetruanta milito.

Ni devas esti tre ĝojaj, ke la gvidantaj personoj en la Nederlanda Federalista Movado tion plene komprenas.

Sabate posttagmeze okazis nia jarkunveno, kies protokolo troviĝas sur paĝo 114 de ĉi tiu numero. Proksimume 40 esperantistoj vizitis la tutan konferencon kaj niajn kunvenojn. Entute estis ĉ. 140 konferencanoj.

La celo de la konferenco estis informi la membrojn de la mondfederalista unuiĝo pri la laboroj kaj rezultato de la Kopenhaga kongreso.

Post nia jarkunveno komenciĝis la laboroj de la nomita unuiĝo. La prezidanto, *D-rando H. J. Nannen*, malfermis la konferencon per kora bonveniga parolado. Plie diris salutvortojn la ĉarma amerika fraŭlino *Lucy Law*, fervora laborantino en la organizaĵo de junaj federalistoj, kaj nia pakistana samideano s-ro *G. Bashir*, kiu memkompreneble parolis en Esperanto.

Poste la prezidanto de la nederlanda delegacio al Kopenhago, s-ro *D. van der Meulen* faris tre impresan paroladon pri la kongreso, en kiu li precipe akcentis la pritraktitan temon pri helpo al la neevoluantaj popoloj.

En la vespero de la sama tago parolis *D-rando Nannen* pri „Regiona Federalismo”, *D-rando Chr. van Wijngaarden* pri la „Ŝanĝoj en la Ĉarto de la Uno”, *D-ro C. P. Gunning* pri „La junularo kaj mondfederalismo” kaj *Mag. G. H. Slotemaker de Bruïne* pri „La Konstituanta Kunveno de la Popoloj” kaj „Mondanigo de urboj”.

Inter du paroladoj la prezidanto petis s-ron *Andreo Cseh* fari Esperanto-

lecionon, precipe por tiuj, kiuj partoprenas en la skriba kurso en la mondfederalista gazeto. La gajaj vizaĝoj, la vigla respondado kaj la kora ridado pruvis la kutiman sukceson.

Dimanĉmatene, post la katolika kaj protestanta diservoj kaj la humanista kunveno, la konferencanoj dividiĝis en kvin komisionojn, por havi la okazon en pli malgranda rondo preparoli kaj diskuti la paroladojn de la antaŭa tago. La junulara komisiono je la propono de niaj liganoj *Andreo Cseh* kaj *Sigismundo Pragano* kun unuanima konsento decidis meti en sian programon la organizon de internacia korespondado kaj vojaĝoj pere de Esperanto.

Tagmeze okazis aparta kunveno por la ĉeestantaj esperantistoj. En tiu kunveno nia sekretario s-ro *Andreo Cseh* donis informojn pri la sukcesplena partopreno de UL en la mondfederalista kongreso en Kopenhago kaj pri la akcepto de la rezolucio por Esperanto, proponita de nia Ligo, kaj post tio preparolis la problemon de la elprolado de Esperanto, precipe pro la disvastiĝo de falsaj reguloj pri la elparolo de la vokaloj.

La lasta kunsido sekvis en la posttagmezo kun parolado de s-ro *J. Sliker*, la sekretario de la mondfederalista unuiĝo, pri estontaj aktivecoj, deklamado de kelkaj belaj poemoj, belega parolado de *D-ro Gunning* kaj fermaj vortoj de s-ro *Nannen*.

Mi estas certa, ke la altnivelaj paroladoj de tiuj gravaj homoj inspiris ĉiujn partoprenantojn al nova, energia laboro por la alta celo de tuthomara unueco!

Mi rajtas diri, ke ĉi tiu ne-esperanta konferenco staris en la signo de Esperanto, ĉar plurfoje la parolantoj menciis la gravecon de Esperanto por la mondfederacia movado. Regis plena akordo pri tio kaj certe la ĉeesto de sufiĉe granda nombro da Esperantistoj plifortigis la favoran sintenon al nia lingvo.

Se ni serioze kaj pli rapide volas venkigi Esperanton, tiam unu el la plej rektaj vojoj al tiu celo estas grandnombre partopreni en ne-esperantistaj internaciaj kaj naciaj kongresoj, kiuj havas pli-malpli egalan celon.

Se en Kopenhago estus ĉeestintaj ducent esperantistoj anstataŭ dek, tiam ni rajte estus povintaj postuli, ke ĉiuj paroladoj estu tradukataj en Esperanton.

Nun estas la ĝusta tempo fari propagandon inter la mondfederalistoj en ĉiuj landoj. La vojo estas glatigita, ĉar



La Plenuma Estraro de UL kun grupo de membroj okaze de la jarkunveno en Woudschoten. La personoj, de maldekstre: Sidantaj sur la planko: (1) *i-ino Brinck* el Hago; (2) *s-ino Kervers* el Hago; (3) *s-ro Bakker*. — Sidantaj en la seĝoj: (1) *inĝ. Voitus van Hamme*, kasisto de UL; (2) *s-ino Isbrucker*, vicprezidantino de UL; (3) *s-ro Cseh*, sekretario de UL; (4) *i-ino Vermaas*, vicsekretariino de UL; (5) *s-ro Ponti*, estrarano de UL. — Starantaj: (1) *s-ro Pragano* el Hago; (2) *s-ino Döbker-Mulder* el Amersfoort; (4) *i-ino Bakker* el Arnhem; (5) *i-ino Maasbommel* el Rotterdam; (6) *s-ino Nannen* el Hago; (7) *s-ro Kervers* el Hago; (8 kaj 9) *ges-roj Weijs* el Apeldoorn; (10) *s-ro Van Heek* el Utrecht; (11) *s-ro Roskes* el Soest; (12) *s-ro Bashir* el Pakistano; (13) *inĝ. Isbrucker*, prezidanto de la Akademio de Esperanto, el Hago. — (La fotografajon faris s-ro Bashir.)

la esperantistoj povos facile ekhavi kontakton pro la fakto, ke la Mond-federalista Kongreso en Kopenhago akceptis la rezolucion pri Esperanto. Ni eluzu tion! Estas nia absoluta devo zorgi, ke en la estonteco Esperanto estu uzata kiel sola kongreslingvo dum la mondfederalistaj kongresoj, por ke ĉiuj nacioj povu egalfacile aŭdigi sian voĉon pri la plej urĝa problemo de nia epoko!

Julia Isbrucker.

De kie? Kien?

De Albert Moldenhauer.

Mi estas nur fajrero,
La flamo ne estas mi,
Sed ankaŭ la fajrero venas
El la eterna lum' de Di'.

Ne estas mi la fonto,
Nur guto en la river';
Malgranda briko estas mi
En la eterna katedral' de Di'.

Ne demandas mi: De kie?
Kaj ankaŭ ne: Kien?
Mi venis el la fonto de Di'
Kaj refluos en la maron de Li.

Trad. Elise Jacobs, UL 5316,
Flensburg, Germanujo.

La 9-a kongreso de T.E.J.O. en Wörgl (Tirolo).

Wörgl, la ĉarma tirola urbeto, aŭdigis pri si la unuan fojon en la jaro 1952, kiam post kuraĝa iniciato de s-ro Hans Steiner oni inaŭguris sur la stacidoma placo la unuan Zamenhof-monumenton en Eŭropo. Diverslandaj esperantistoj ĉeestis tiun imponan feston.

Dum aŭgusto 1953 denove Esperanto-lingvaj babilado kaj kantado plivigligis la stratojn de Wörgl. Anoj de la Tutmonda Esperantista Junular-Organizo kunvenis el 12 landoj por partopreni en la 9-a kongreso. La enloĝantoj de Wörgl, kiuj antaŭ la starigo de la Zamenhof-monumento eble neniam aŭdis pri Esperanto, (en Wörgl loĝas ja nur du aktivaj esperantistoj!), nun povis konvinkiĝi, ke por la disĉiploj de D-ro Zamenhof ne ekzistas lingvaj baroj, ke inter la esperantistaro regas agrabla sfero, sincera amikeco. Ili povis vidi, ke dank' al Esperanto infanoj el Maroko senĝene kaj gaje ludas kun infanoj el Aŭstrio aŭ Anglujo. Kaj tiuj, kiuj deziris kontakti kun la anoj de la Junular-Organizo, povis bedaŭri, ke ili ne scias Esperanton.

La grandegan laboron de la kongres-preparo faris *I-ino Kainer*, urba oficistino, kaj s-ro *Hans Steiner*. Ili zorgis pri tio, ke la gejunuloj ekkonu la pentrindan ĉirkaŭaĵon. Admirinde belaj estis la ekskursoj al la fama ŝlimbordbanejo en *Kirchbichl*, al *Wildschönau*, al *Kufstein* kaj al la 2500 metrojn alta *Hafelekar* apud *Innsbruck*.

Kun danko en la koro metis la junularo

florkronon al la Zamenhof-monumento. Ankaŭ sur la tombon de la mortinta urbetro, kiu helpis starigi la monumenton, oni metis florojn.

Por multaj partoprenantoj restas neforgeblaj la Tirola Vespero, la Internacia Balo kaj diversaj aliaj aranĝoj. Dimanĉe okazis katolika diservo, en kiu bele predikis la konata Esperantista kaplano s-ro *Kaps el Salzburg*.

Preskaŭ ĉiujn aranĝojn partoprenis ankaŭ la enloĝantoj de Wörgl, kaj multaj el ili promesis kiel eble plej baldaŭ lerni Esperanton.

Kortega konsilisto *Hugo Steiner*, fondinto kaj direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, partoprenis la kongreson dum kelkaj tagoj kiel honora prezidanto de la Loka Organiza Komitato. Dum la oficiala malfermo li tre lerte tradukis la diversajn salutparolojn.

Multaj eminentuloj, inter kiuj ankaŭ *kardinalo Innitzer*, sendis saluton al la TEJO-kongreso.

Sed la junularo ne nur amuzis sin. Dum la ĝenerala jarkunveno ĝi serioze pritraktis kelkajn gravajn problemojn. Precipe la internacia kontakto kaj la kolektiva aliĝo de la jam ekzistantaj esperantistaj junular-grupiĝoj al TEJO havis ĝian planan atenton. Ĉar la estraro de TEJO ne povis partopreni pro militservo, la kongreson gvidis *s-ino E. Burgler*, redaktorino de „La Juna Vivo“, el Nederlando.

AL LA VENKO!

Ĉi tiu rubriko entenas gravajn informojn, kiuj estas destinitaj ankaŭ por publikigo en la naci-lingva gazetaro. La legantoj de *La Praktiko* estas petataj traduki la informojn kaj transdoni ilin al siaj lokaj gazetoj.

1197. Esperanto-resumoj en itala federalisma revuo. — La itallingva monata revuo „*Federalismo nel Mondo*“, eldonata en Torino (Italujo), publikigas regule post ĉiu artikolo resumon ankaŭ en Esperanto apud la lingvoj franca kaj angla. — (La jarabono kostas por Italujo 600, por la eksterlando 800 Lirojn. Adreso de la red. kaj adm.: Via Cibrario 36, Torino, Italujo.)

1198. Norvega pramŝip-entrepreno uzas Esperanton. — La norvega pramŝip-entrepreno „*A.S. Larvik-Frederikshavn-Ferjen*“, plenumanta la ŝiptrafikon por pasaĝeroj kaj aŭtomobiloj inter la dana haveno Frederikshavn kaj la norvegaj havenoj Larvik kaj Frederikstad, uzas Esperanton kaj publikigas siajn veturtabelojn kaj tarifojn ankaŭ en ĉi tiu lingvo. — (La adreso de la firmo: Postboks 2443, Oslo, Norvegujo.)

1199. La Foiro de Padova uzas Esperanton. — La Internacia Specimena Foiro de Padova (Italujo) daŭrigas la regulan uzadon de la lingvo Esperanto en sia korespondo kun la eksterlando kaj ankaŭ en la nuna jaro eldonis siajn informajn kaj reklamajn presajojn en Esperanto, okaze de la lasta Foiro (13-28 de junio 1953), en kiu funkciis speciala Esperanto-fako. — (La estro de la Esperanto-fako estas s-ro *Giovanni Saggiori*, AM de UL. — La adreso de la Foiro: Via N. Tommaseo 59, Padova, Italujo.)

1200. Esperanto en doktora disertacio. — La anglalingva disertacio, titolita „*Energies and Polarizabilities of Compressed Atoms*“ (Energioj kaj Polarizebloj de Kunpremitaj

Atomoj), per kiu s-ro *C. ten Seldam* en Amsterdam (Nederlando) akiris la doktoran titolon ĉe la Universitato de Utrecht, enhavas detalan resumon en la lingvo Esperanto, kaj same la klarigajn tekstojn ĉe la ilustraĵoj. — (D-ro *C. ten Seldam* estas Aktiva Membro de UL kaj nederlanda peranto de la Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj. Lia disertacio aperis en la eldonejo *Van Gorcum & Co. N.V., Assen, Nederlando*.)

1201. Esperanto-rubriko en sveda pacifista gazeto. — La monata gazeto „*Freden*“ (La paco), organo de la Sveda Asocio por Paco kaj Arbitracio (*Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen*) publikigas en ĉiu sia numero regulan Esperanto-rubrikon kun svedlingvaj artikoloj pri la Esperantomovado. — (La abonprezo de la gazeto estas por unu jaro 3.50 sv. kr., por duonjaro 1.80 sv. kr. Adreso de la red. kaj adm.: Jungfrugatan 30, 3 tr., Stockholm 5, Svedujo.)

1202. Esperanto devige instruata en brazila gimnazio. — La direktoro de la gimnazio „*Rui Barbosa*“ en *Fortaleza*, ĉefurbo de la brazila ŝtato Ceará, en januaro nunjara enkondukis la devigan instruadon de Esperanto, kun unu leciono ĉiu-semajne. — (Estus tre konvene kaj utile, se niaj legantoj sendus skribajon de gratulo kaj danko al la direktoro de la gimnazio: S-ro *Francisco Jorge de Abreu*. La adreso de la gimnazio: *Avenida do Imperador 372, Fortaleza, Ceará, Brazilo*.)

1203. Esperanto-elsendoj en la Svisa Radio. — La stacio Bern de la Svislanda Radio daŭrigas siajn regulajn elsendojn de informoj kaj prelegoj en la lingvo Esperanto. En ĉiu mardo D-ro *A. Baur* donas informojn kaj prelegojn pri temoj rilatantaj al Svislando, kaj en ĉiu jaŭdo D-ro *Edmond Privat*, profesoro ĉe la Universitato de Neuchâtel kaj prezidanto de Universala Ligo, parolas pri federalismo kaj mondopaco. — (La horojn kaj ondolongojn niaj legantoj trovas en la aparta radio-programo de *La Praktiko*.)

JUBILEA KONGRESO DE LA ITALAJ ESPERANTISTOJ

en Como, 5-9 de septembro 1953

Kun komenco de la Itala Esperanto-Kongreso, kiu okazis en la jaro 1951 en la urbo Pisa kaj en kiu partoprenis oficiale ankaŭ lia moŝto Prof. Segni, ministro de la publika instruado, la italaj Esperanto-kongresoj fariĝas iom post iom pli internaciaj. Unu el la kaŭzoj de tio estas certe ankaŭ la fakto, ke ĉe la italaj naciaj Esperanto-kongresoj la eksterlandaj samideanoj ne bezonas pagi kongreskotizon, kaj la Kongresa Organiza Komitato post ilia simpla peto sendas al ili hejmen tute senpage la kongreskarton.

Jen, do, ĵus okazis, dum la tagoj 5-9 de septembro en la urbo Como (elparolu: komo) la 25-a Itala Esperanto-Kongreso kun la partopreno de centoj da eksterlandaj geesperantistoj: svisoj, francoj, finnoj, danoj, jugoslavoj, germanoj, aŭstroj, svedoj, nederlandanoj, hispanoj kaj britoj. Inter la italoj ne mankis triestanoj, sicilianoj, kaj eĉ el la insulo Sardinio venis 31 verdsteluloj. Entute pli ol 500 gekongresanoj venis al la bela kongresurbo ĉe la bordo de la mondfama lago en Norda Italujo.

La kongreso de Como havis grandan sukceson, same kiel antaŭ unu jaro la 24-a itala kongreso en Bologna. Profesoro Edmond Privat, oficiala preleganto en la malferma kunsido, per sia elokventa kaj enhavriĉa parolado pri

la temo „*Esperanto kiel edukilo al mondunueco*” vere ravis ĉiujn ĉeestantojn, kiuj plenigis la grandan salondon de la imperiestra Vilao Olmo ĉe la bordo de la lagō. Post li prelegis la kongresa prezidanto Prof. Canuto, rektoro de la Universitato de Parma.

Antaŭ la prelegoj salutis la kongreson la reprezentantoj de la alilandaj esperantistaj organizaĵoj. Inter ili la delegito de Universala Ligo kaj de la Internacia Esperanto-Instituto estis la nederlanda scienculo D-ro Inĝ. G. Hamming, kiu kelkajn tagojn antaŭe partoprenis en Bellagio la internacian konferencon de la Biometrika Societo, kiel delegito de la nederlanda registaro.

La urbestro de Como, kiu ankaŭ partoprenis en la solena malferma kunsido, regalis la kongresanojn per ĉampano kaj dolĉaĵoj, kaj permesis senpagan viziton al la ekspozicio de la pentraĵoj de la fama pentristo Bernardino Luini, kies prezentanto kaj klariganto li mem volis esti. La pentraĵoj estis ekspoziciitaj en apartaj salonoj de la sama konstruaĵo, kiu estis disponigita al la esperantistoj kiel kongresejo.

Aliaj elstaraj aranĝoj en la programo de la kongreso estis: prelego de Prof. Gambirasio, prezidanto de la Komerca Cambro de Bergamo, la arta kaj distra vespero, en kies varia programo bonege

ludis, kiel veraj artistoj, gesamideanoj el Massa-Carrara (inter ili vera virtuozo estis la tenoro Pietro Brani), Como kaj Milano, plue la agrabla ŝipekskurso tra la lago de Como al la Vilao Carlotta kaj al Bellagio, kaj fine la oficiala kongresa balo en la admirinda salonego de la Vilao Olmo.

Notinda honoro, kiun la kongreso ĝuis, estas, ke lia ekscelenca moŝto Prof. Luigi Einaudi, prezidanto de la Itala Respubliko, denove akceptis esti prezidanto de la Honora Komitato de la kongreso, same kiel li konsentis tion ankaŭ en la pasinta jaro por la kongreso en Bologna.

Multan gratulon kaj dankon meritas s-ro D-ro Azzi, prezidanto de la Organiza Kongresa Komitato, al kies fervora laboro la geesperantistoj ŝuldas la grandan sukceson de ĉi tiu Nacia-Internacia Kongreso.

D-ro Inĝ. Otello Nanni, UL 8659.

ITALA RADIO

La stacio ROMA de la Itala Radio elsendas en Esperanto ĉiusemajne dufoje, merkrede kaj vendrede, de la horo 19:00 ĝis 19:20 laŭ mez-eŭropa tempo sur la mallongaj ondoj de 25.21, 31.35 kaj 49.92 metroj.

Programo por Novembro 1953:

4. — Novaĵoj el Italujo.
6. — Italaj belartaj urboj: Parma.
11. — Italaj artistoj: Enrico Caruso.
13. — La libroj kaj Esperanto.
18. — Speleologio kaj subtera turismo.
20. — „La flegisto de paĉjo” el la libro „Koro” de Edmondo De Amicis.
25. — La 1-a eklogo de Virgiljo (Melibeo kaj Titiro).
27. — Respondoj al la aŭskultantoj.

PACON, SINJORO!

Pacon, Sinjoro, donu al niaj tagoj
Persiste turmentataj de l' ĉagreno:
Naskiĝu la estimo en la agoj,
En la mondo rebrilu la sereno!

Pacon, Sinjoro, donu al la animoj
En senĉesa peniga maltrankvilo:
Ho, forlugu el ĉiu kor' la timoj
Kaj la dolor'! Ridetu la pupilo!

Pacon, Sinjoro, al la familioj
Time vivantaj sub detruminaco:
Ilin streĉligu amaj energioj
Protektataj de daŭra dia graco!

Pacon, Sinjoro, al la patrolando!
En ĝi regu prospero kaj konkordo;
La filoj kunlaboru al ĝia granda
Per konstanta progreso en la ordo.

Pacon, Sinjoro, inter la nacioj
Sin rigardantaj kun suspekta koro:
Celante al tutmondaj harmonioj
Fратиĝu la homar'! Pacon, Sinjoro!

Luigi Minnaja, UL 3141



Gaja grupo de italaj gesamideanoj el la insulo Sardinio, okaze de la ŝipekskurso sur la lago de Como dum la Jubilea Kongreso de la Italaj Esperantistoj.
(Foto de D-ro Inĝ. O. Nanni, Bologna.)

Beethoven surda

La aŭdosento estis ĉio, ĉio.
Kaj li ne aŭdis plu. Kaj li komprenis
Ke li neniam aŭdos plu. Nenio
Revenos. Ĉion la silent' forprenis.

Tio la fino estis.

Hiacintoj
Per bluaj sonoj tintis; ĉiu stelo
Al li parolis; voĉoj de mortintoj
Profete ploris apud la orelo.

La luno iĝis gongo. Lonicero
Trumpetis per parfumo; la fragmitoj
Iĝis verdetaĵ flutoj; kaj la tero
Kaj la planedoj kantis sur orbitoj.

En la orel' ne estis ia sono;
Sed nervoj distreĉitaj per torturo
Iĝis la kordoj de la violono
Kaj lia granda koro, la tamburo.

Birdoj por li ne kantis. Sed la fornoj
De ŝtormaj sunleviĝoj per koloro
Estis por la surdulo grandaj kornoj;
Hobojoj estis rozoj perodoro.

Fortepianon sur la brila maro
Faris la suno; kaj la oraj klavoj
Ekharmoniis kun la sun-fanaro,
Latuna suno, oraj mar-oktavoj!

Angore li kriegis al la mondo
Kaj brile la silenta mond' resonis;
Triumfe venis venko, la respondo;
Denove, pli potence, li komponis.

F-ino Marjorie Boulton, UL 8979
Hexham, Anglujo.



LA AŬTUNO

(El la serio de alegoriaj bildoj pri la jarpartoj, de la eminenta nederlanda pentristo kaj desegnisto J. F. Doeve. — Kliŝo de „Getouw”, organo de la Teks-Industria A.S. De Wit kaj ties vendorganizo „Helmonda Teks-Asocio”).

ĈU BESTOJ HAVAS SCION PRI TEMPO?

KELKAJ FRAPANTAJ KAZOJ

La franca scienculo *De Cherville*, kiu multe okupis sin pri bestoj, rakontas la sekvantan veran historion:

Iu kuracisto, kiu loĝis en vilao apud Cannes, posedis tri hundinojn, kiuj ĉiam restis unu proksime al la alia. Ili havis komunan hejmon en la stalo apud la loĝdomo.

La kuracisto komisiis la ĝardeniston, bone lavi kaj beligi la hundojn en ĉiu dimanĉo. Du el ili volonte lasis sin purigi, sed la tria treege malŝatis la lavadon. Ĉi tiu forte kontraŭstaris, sed la ĝardenisto estis pli forta, do la obstina hundino ne sukcesis eviti la kosmetikan operacion.

Sed post kelkaj semajnoj en iu dimanĉo la ribelanta hundo sukcesis forkuri dum la matena promeno, kiu okazis antaŭ la lavado. Ĝi revenis nur malfrue en la posttagmezo. En la sekvinta semajno la sama afero okazis, denove la hundo eskapis antaŭ la lavado.

Tiu fenomeno multe interesis la doktoron. Li decidis esplori la aferon kaj faris la sekvantan eksperimenton. Anstataŭ lavi la hundojn en la dimanĉoj, la ĝardenisto

devis fari tion de nun en la jaŭdoj. En la komenco la hundo estis viktimo de ĉi tiu ŝanĝo kaj kontraŭvole laviĝis. Sed post kelkaj semajnoj ĝi evidente komprenis la ŝanĝon kaj de tiam ĝi malaperis ĉiun jaŭdon frue por reveni en la posttagmezo!

La sekvanta ekzemplo estas ne malpli interesa:

Maljuna vidvino, loĝanta en la strato *Pépinière* en Parizo, havis malantaŭan ĉambron, kiu rigardis al granda ĝardeno. Ĉiutage je la sama horo ŝi metis telereton kun lakto kaj paneroj sur la fenestro-breton. La birdoj jam kelkajn minutojn antaŭ la meto de la telereto eksidis sur la arboj, kaj ĉiam kelkaj, la plej imperinentaj, flugis sur la fenestro-breton kaj per sia beko frapis la fenestron.

La vidvino havis la kutimon pasigi la dimanĉojn ĉe sia edziniĝinta filino, kiu loĝas ekster Parizo. Ŝi ĉiam foriris jam frue, timante, ke ŝi ne trafos la vagonaron, kaj tiel en la dimanĉoj ŝi ne elmetis la telereton.

En iu dimanĉo ŝi ne povis vojaĝi pro fervojista striko, kaj restis hejme. Je la

sama ĉiutaga horo ŝi metis la nutraĵon sur la kutiman lokon. Je ŝia granda miro neniu birdo venis preni la panerojn; dum la tuta mateno ne estis eĉ unu birdo en ŝia ĝardeno. La birdetoj do sciis, ke en la dimanĉoj ne atendas ilin nutraĵon en tiu ĝardeno. En la sekvinta tago la tuta birdaro prezentis sin denove!

Tria fakto, ke bestoj havas ideon pri tempo, estas komunikita de la scienculo *Emile Gauthier*. Unu el liaj amikoj, kiu tre amis bestojn, havis du hundojn, sed ĉar li disponis pri malmulta libera tempo, li nur malofte povis okupi sin pri ili. Tamen li dediĉis ĉiam unu matenon en la semajno por fari promenadon de kelkaj horoj kun la hundoj. Evidente tiuj promenadoj kun la mastro tre plaĉis al ili.

Ĉiam en la sama tago estis festo por la hundoj, kaj post mallonga tempo unu el la hundoj ĉiam anoncis tiun feston per laŭta bojado en la frua mateno, kio sendube estis pruvo de ĝojo pri la venonta promeno. La besto certe precize sciis, en kiu tago la mastro kutimas fari la ekskurson kun la hundoj.

Oni povas konkludi el ĉi tiuj rakontoj ankaŭ, ke la inteligenteco ĉe la individuoj en la sama bestospeco ne estas egala, same kiel ĉe la homoj!

KONGRESO DE GEFRAŬLOJ

Mil fraŭloj kaj fraŭlinoj el sep landoj kunvenis en la nederlanda urbeto Grevenbicht por la unua internacia kongreso de gefraŭloj.

La tri tagoj 19—21 de septembro estis tempo de historia okazaĵo en la nederlanda urbeto *Grevenbicht*. Certe neniu leganto, ankaŭ ne la nederlandaj, scias, kie kuŝas ĉi tiu loko, sed ĝi fariĝis en unu semajno fama. *Grevenbicht* situas apud *Sittard* en la suda parto de la nederlanda provinco *Limburg*, kaj ĝi meritas laŭdon pro la originala iniciato organizi kongreson de gefraŭloj. La organizo estis bonega kaj la sukceso granda.

Vivu la fraŭleco kaj la ... fraŭlineco!

Grevenbicht faris grandan venkon, kaj kvankam ĉi tiu venko estas tute alispeca ol militistaj venkoj, oni simbolis ĝin ankaŭ per la montra kaj meza fingroj en la konata formo de la litero V.

Grevenbicht venkis la mokojn, kiujn oni konstatas ofte

pri tiu kasto de nia homaro!

Sinjoro *G. Greyn*, la komunuma sekretario de la nomita urbeto, membro de la provinca parlamento de *Limburgo*, kiu solece pasigis jam dekojn da jaroj, volis silentigi la mokantojn. La progresema sekretario opiniis, ke oni devas ion fari, kaj li efektive faris ion.

Granda entuziasmo eksplodis post la publikigo de liaj planoj, organizi kongreson por gefraŭloj; la enloĝantoj de *Grevenbicht* neniam forgesos tion. Ekzemple la poŝtistoj, kiuj dum kvar semajnoj ŝvitante devis tralabori la amason da leteroj, alvenintaj el ĉiuj partoj de la mondo, kaj ne malpli la membroj de la fraŭla komitato, kiuj devis organizi la kongreson kaj kiuj devis peti la helpon de la edzoj kaj edzinoj en la multegaj laboroj por la kongreso.

Multo okazis tie en *Grevenbicht* dum tiuj kvar semajnoj, pli ol en ducent jaroj, diras la enloĝantoj. La devizo: „*Gefraŭloj de ĉiuj landoj, unuiĝu!*“ estis legebla sur la frontpaĝoj de enlandaj kaj eksterlandaj gazetoj. Kaj la respondoj venis amase; la tuta urbeto povas multon rakonti pri tio kaj havas sufiĉan materialon por tuta jaro. Sed jam nun oni laboras por organizi la duan kongreson, kiu okazos en la sekvonta jaro sub la devizo: „*Gefraŭloj, en la sekvonta jaro denove al Grevenbicht!*“

Gajega kunveno.

La kongreso, ĉar ĝi meritis la nomon de kongreso, kvankam oni ne celis pritrakti seriozajn problemojn, festis ceremoniojn kaj kutimojn de la provinco *Limburg*, kiuj vivas tie jam de centoj da jaroj.

Al la limburga folkloro apartenas festado, de kiu la nordnederlandanoj povas preni ekzemplon. *Grevenbicht* ne estas granda loko, sed trinkejoj kaj amuzejoj estas tie relative pli multaj ol ie alie. La 2500 enloĝantoj disponas pri 26 kafejoj, kio montras, ke ili estas tre soifaj, sed feliĉe estas ĉiam sufiĉe da biero kaj *Coca-Cola* por kontentigi la soifantojn. En grandaj urboj ne estas malfacile organizi kongreson, sed pripensu, ke tiu laboro estis farata en vilaĝo, kie en kelkaj loĝejoj mankas ankoraŭ akvo-konduko, kie la hoteletoj nur malofte vidas gastojn, kie ne estas trairanta trafiko, ĉar la vilaĝo finiĝas ĉe la rivero *Maas*. Krom tio la ideo de tiu kongreso atestas pri granda originaleco, kaj tial oni prave povas diri, ke en *Grevenbicht* io eksterordinara okazis.

Jen alvenas la gajaj gefraŭloj sub la gvido de sia spirita patro s-ro G. Greyn. Kiel triumfanta militestro li staras en la aŭtomobilo kaj per la fingroj montras la signon V, kiu nun signifas ne nur la anglan vorton „victory“ (venko), sed ankaŭ la nederlandan vorton „vrijgezel“ (fraŭlo).





SUPRE: La „lumreĝino” Lucia el la proksima vilaĝo Beek, akompanata de ĉarmaj lumprincinoj, en plena pompo kaj gloro eniras en la vilaĝon Grevenbicht.

SUPRE MALDEKSTRE: Mag. Corten, urbestro de Grevenbicht, kun (de maldekstre): la „florreĝino” el la apuda urbeto Papenhoven, la „fraŭlinreĝino” el Ecaussinnes-La-laing (Belgujo) kaj unu el la honorfraŭlinoj.

En la kolorriĉa festprocesio marŝis ankaŭ grupo el la popolo de la indonezia insulo Ambon. Per siaj pompaj kapornamoj kaj seriozaj vizaĝesprimoj ankaŭ la ambonanoj substrekis la profundan signiton de la fraŭleco.

Tuta fruktarbaro malaperis.

La pli maljunaj enloĝantoj malĝoje rigardis la hakilojn, kiuj forhakis grandan parton de bela fruktarbaro por fari lokon por la grandega kongres-tendo. Ankaŭ la enloĝigo de tiom da fremdaj homoj trovis kontraŭstaron, sed sinjoro Greyn venkis ĉiujn malfacilaĵojn kaj konsentigis ĉiun porti la necesajn oferojn.

Kaj tiam la tuta vilaĝo komencis laboregi! En kvar semajnoj ili estis pretaj. Ĉiuj lumoj en la vilaĝo brulis, estis sufiĉaj litoj por la gastoj, manĝejoj abundis; sur-papere ĉio estis en plena ordo. Ke en la praktiko ne ĉio iris tiel glate, estas memkomprenebla, kaj neniu riproĉis tion.

Certe ne la malmultaj fraŭloj, kiuj en la unua nokto ne

Fortan tenton de du flankoj heroe kontraŭstaras ĉi tiu 66-jara sinjoro, konvinkita kaj ĝismorte fidela ano de la fraŭla kasto.



povis trovi dormejon, sed kiuj tamen en la frua mateno povis ekdormi. Kaj certe ankaŭ ne tiuj fraŭloj, kiuj kiel sekvo de la kongreso forlasos sian solecon kaj faris edziĝpromesojn. Ĉu tio verdire estis la celo de la kongreso? Tute ne, kvankam estus tute nature, se oni iomete helpus timemajn edziĝemulojn. La celo estis doni indan lokon al la fraŭleco. La juna, entuziasma urbestro s-ro L. J. H. Corten diris dum la solena malfermo en la kongres-tendo:

— Glorigo de la fraŭleco ne estas nia intenco. Ĉi tiu kongreso ankaŭ ne estas organizita kiel edziĝ-foiro. Nia sola deziro estas en agrabla maniero tiri la atenton al vi.

Ĉi tiuj vortoj trovis grandan aprobon ĉe la partoprenantoj. Kelkfoje ne estas agrable montri sian staton en ĉi tiu mondo, kaj ke ili estis gefraŭloj, estis klare videble, ĉar ĉiu portis sur la brusto grandan literon „V”, la komencliteron de la nederlandlingva vorto „vrijgezel” (fraŭlo).

Solena enmarŝo de la geherooj.

La enmarŝo de la herooj estis tre hezita. La invitanta muziko de diversaj orkestroj, kiuj venis de proksime kaj malproksime, unue vane logis ilin enviciĝi, sed fine tio sukcesis. Kaj ne daŭris longe, ĝis ili gaje kantis malnov-



Kun grandega bruo, tarata per buŝoj kaj per muzikiloj, marŝas tra la vilaĝo la plantantoj de la maj-arbo kaj la kamparana muzikistaro el la urbeto Valkenburg.

nederlandajn kantojn, kiel decas al fraŭloj, kiuj ankoraŭ ne mortis pro soleco kaj ĉagreno. Eĉ la konata kanto „Ĉie, kie estas la knabinoj, estas balo”, estis kelkloke aŭdata. Kaj jen montriĝis la diferenco, kiu ekzistis inter la kongresanoj, kvankam tio ne ĝenis la belan harmonion: la diferenco inter tiuj, kiuj estas principaj fraŭloj, kaj tiuj, kiuj volonte ŝanĝus sian staton, se la sorto portus taŭgan okazon.

La lastaj ne kaŝis tiujn sentojn kaj memkompreneble iliaj rigardoj renkontis simpatian ĉe la alia sekso Ankaŭ tiurilate la kongreso faris bonan laboron; pri tio povas atesti ĉiu, kiu kuraĝis iri al Grevenbicht.

Multaj eksterlandanoj.

Sed sen konsidero de tiuj intencoj, la preskaŭ mil nederlandanoj kaj eksterlandanoj el Luksemburgo, Belgujo, Germanujo, Anglujo, Ameriko kaj Aŭstralio travivis belegajn tagojn. Grevenbicht donis

MALDEKSTRE: Post ŝvitiga laborego fine la maj-arbo jam staras preskaŭ vertikale. Post kelkaj momentoj la arbo estos baptata, kaj tiam povos komenciĝi la solena rondodancado de la gefraŭlaro.

DEKSTRE: Dum la plantado de la maj-arbo inter la gefraŭloj troviĝis ankaŭ unu edzo: la urbestro de Grevenbicht, sinjoro magistro Corten. En la bildo oni povas rekoni lin per la oficiala nigra vesto kaj la alta ĉapelo.

la plej interesajn folklorajn okazaĵojn, kiujn la plej multaj kongresanoj neniam antaŭe vidis. Estis tie la maj-knaboj el alia vilaĝo kun la provokaj pajlaj ĉapeletoj kaj ilia gvidanto kun bruanta harmoniko; estis la maj-paro, estis la plantantoj de la maj-arbo el Valkenburg, la kamparana muzikistaro, la lum-reĝino Lucia, la fraŭlina reĝino el Belgujo, la flor-reĝino, la orkestroj de la pafistoj k.t.p. Seriozaj programpunktoj estis: prelego de la eminenta folkloristo D. J. van der Ven el Lunteren kaj prelego pri la psikologio de la fraŭleco.

Ĉiuj gefraŭloj samopinias, ke la tritaga restado en Grevenbicht estis riĉega en travivaĵoj. Ili ĉiuj intencas reveni en la sekvonta jaro, kompreneble kun la escepto de tiuj, kiuj ne plu estos fraŭloj. (El „Wereldkroniek”.)



KONFERENCO DE LA KRISTANAJ ESPERANTISTOJ

en Rüdlingen (Svislando), dum la 4-9 de aŭgusto.

La Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en ĉi tiu jaro kunvokis sian anaron por internacia konferenco en la bela norda regiono de Svislando. Tuj post la Universala Esperanto-Kongreso en Zagreb, de la 4-a ĝis la 9-a de aŭgusto, kolektiĝis sesdeko da KELI-anoj en la modela hejmo de la „Reformierte Heimstätte“ apud Rüdlingen, vilaĝo inter Schaffhausen kaj Zürich.

Kiel la apuda bildo montras, partoprenis en la kunveno junuloj kaj maljunuloj. Ĉiuj aĝoj estis reprezentataj, de la 5-a vivjaro ĝis la 80-a.

Tre agrablan semajnon kun riĉa programo ni havis. Nia ano, s-ro Fritz Liechti el Zürich lerte organizis la tuton, kaj la konferenco donis al la tuta partoprenantaro variajn, pripensindajn kaj neforgeseblajn travivaĵojn.

Interkonatiĝa vespero, studado de la Biblio, atestkunveno en Schaffhausen kaj diservo en Buchberg, apud preleĝoj, belaj ekskursoj al Bürgenstock, Rejnoŝtalo, insulo Mainau, Zürich k.t.p. okazis en la kadro de la programo. S-ino Anna Alamo-Sandgren el Svedujo prelegis pri la temo: „Kiel plej efike disvastigi la evangelion per Esperanto?“ kaj „oncle Jean“ (s-ro J. Argenta el Francujo) kaptis nian atenton per sia preleĝo sub la titolo: „Kiel ni interesigu la kristanan junularon por Esperanto kaj por KELI?“.

Ankaŭ en nia 6-a internacia konferenco regis la kutima



La partoprenintoj en la KELI-konferenco en Rüdlingen. (Mallongigoj: F = el Francujo; G = el Germanujo; N = el Nederlando; S = el Svislando; Sd = el Svedujo.)

La infanoj, sidantaj surtere, de maldekstre: Cootje van Spronsen, N; Hedi Liechti, S; Malou Lanoux, F; Edith Liechti, S, la plej juna partopreninto; Mathé Lanoux, F.

En la unua vico (sidantaj): f-ino M. Flach, N; f-ino M. de Zeeuw, N; f-ino E. Steinmann, S; f-ino T. Meijering, N; s-ino E. Hoppe, G; s-ino S. Dabezies, F; s-ino J. Schokker, N; s-ino E. Walder, S; f-ino R. Gullberg, Sd; s-ino G. IJben, N; f-ino Zw. Hoving, N; s-ino T. Visser, N; f-ino T. Putto, N; s-ino S. Lanoux, F; s-ino M. Utbult, Sd; f-ino B. Almesten, Sd.

En la dua vico: s-ino T. van der Wal, N; f-ino Erd. Hoppe, G; s-ino B. van Spronsen, N; s-ino Anna Alamo,

Sd; f-ino E. Okma, N; pastoro R. Hoppe, G; pastoro E. Waldvogel, S; s-ino H. Liechti, S; s-ro F. Liechti, S; s-ro D. de Boer, N; s-ro R. van Spronsen, N; s-ro J. Argenta, F; s-ro H. G. Havik, la 80-jara partoprenanto, N; s-ino T. Persson, Sd; f-ino O. Fosen, Sd; f-ino S. Strömberg, Sd; f-ino E. Larsson, Sd.


En la tria vico: s-ro W. Stoll, G; s-ro J. IJben, N; s-ro L. Lanoux, F; s-ro H. Dabezies, F; s-ro J. Schokker, N; s-ro Ivar Karlsson, Sd; s-ino K. Karlsson, Sd; s-ro G. Frederiksson, Sd; f-ino G. Aronsson, Sd; s-ro B. van der Wal, N; f-ino J. Kjellgren, Sd; s-ro A. Sümmerner, G; f-ino L. de Kuijper, N.

En la kvara vico: s-ro T. Gelin, Sd; restas kvin servistinoj de la konferencejo, kaj meze de ili pastoro Sigg, estro de la „Heimstätte“ el Schaffhausen.

familia atmosfero, kaj super ĉio la kristana kredo kaj la komuna mondlingvo kunligis nin, homojn el diversaj landoj kaj nacioj.

Jam nun mi povas komuniki, ke por la venonta jaro 1954 KELI invitos sian anaron al Nederlando, por sia 7-a internacia konferenco. Ni esperas renkonti niajn membrojn kaj simpatiantojn en la konferencejo „Pietersberg“ ĉe Oosterbeek apud la urbo Arnhem, tuj antaŭ la Universala Esperanto-Kongreso en Haarlem.

D. de B. (UL 20), sekr. de KELI.



Naskiĝo. — Al ges-roj SANNWALD (AM de UL) en Zürich (Svislando) la 29-an de julio naskiĝis fileto: André. Ĉi tiu, kune kun sia frateto Roger, estas nepoj de s-ino Luise Riedle, reprezentantino de UL por Svislando.

— Al ges-roj Robert NARDON (54 bis, rue de Lancry, Paris-10, Francujo), la 29-an de septembro naskiĝis fileto: David. La ĝojaj gepatroj dissendis pri tio informon presitan en Esperanto.

Morto. — La 25-an de julio mortis en Innsbruck (Aŭstrio) la tirola Esperanto-nestoro s-ro Josef BAUER, AM de UL, en la aĝo de 83 jaroj. Du tagojn antaŭe li ankoraŭ en plena freŝeco partoprenis en la 6-a Aŭstria Esperanto-Kongreso en Klagenfurt. Lia subita morto estas grava perdo precipe por la Esperanto-Klubo de Innsbruck, kies multjara tre fervora membro kaj kasisto li estis.

— La 23-an de septembro mortis en Hago (Nederlando) f-ino Christina S. W. C. E. OF-

FERHAUS, apotekistino, AM de UL, en la aĝo de 81 jaroj. Dum jardekoj ŝi tre aktive kaj ofere partoprenis en la nederlanda Esperanto-movado, precipe kiel animo de la Esperanto-societo „Fine Ĝi Venkos“ en Hago, kaj kiel Deleĝitino de UEA dum longa tempo. Ŝia enterigo okazis la 26-an de septembro en la tombejo „Oud Eik en Duinen“.

— La 20-an de aŭgusto mortis kaŭze de kormalsano s-ro Jak CENT (antaŭe Centnerszwer) en Glasgovo (Skotlando), en la aĝo de 53 jaroj. Li estis pol-devena lokomotiv-inĝeniero kaj antaŭ la dua mondmilito loĝis en Valenciennes (Francujo), kie li estis tre aktiva en la Esperanto-movado. Kiel ano de la Pola Armeo post la kapitulaco de Francujo li transiris en Britujon, prenis kontakton kun la britaj esperantistoj kaj post la militfino, ekloĝinte en Glasgovo, li valore helpis la tiean Esperanto-Societon per preleĝoj kaj kursgvidado. Li estis Aktiva Membro de UL kaj partoprenis en la somerferio de UL en Dover. Lia morto estas grava perdo por la Esperanto-movado en Skotlando.

S-ro Goldsmith en Nederlando. — S-ro C. C. Goldsmith, ĝenerala sekretario de U.E.A., en la lastaj tagoj de oktobro faros viziton al Nederlando, por intertraktadoj en kunligo kun la venontjara Universala Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Haarlem. La 30-an de oktobro ves-

pere li faros publikan paroladon en Rotterdam pri la temo: „La historio de la organizado de la internacia Esperanto-movado“. Li estas ekstreme kompetenta por paroli pri tiu temo, ĉar li partoprenis preskaŭ ĉiujn diskutojn en tiu afero dum la lastaj dudek jaroj. Post la parolado li estos preta respondi je demandoj, kiuj estas interesaj por la ĉeestantoj. La kunveno, aranĝata de la tri lokaj sekcioj (Mercurio, La Espero, Esperanto Estu Nia Celso) de L.E.E.N., okazos en la salono n-ro 6 de la Komerca Borso (Meent, enirejo de la Blua Salono), kun senpaga eniro, kaj komenciĝos je la 20-a horo.

Esperanto-kongreso en Brazilo. — La proksima 14-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos dum la tagoj 7-14 de januaro 1954 en Curitiba, ĉefurbo de la brazila ŝtato Paraná. Dum la kongreso estos aranĝata ankaŭ granda internacia letervespero, por kiu la organiza komitato atendas multajn skribajojn el la tuta mondo.

„La mondo ne havas atendejon“ ludita en Rotterdam. — La haga teatra grupo „Verda Masko“ la 28-an de septembro sukcesplene ludis denove la aktualan dramon de Maurits Dekker, en la teatro „La Lanterno“ en Rotterdam. Antaŭ la prezentado f-ino M. H. Vermaas, kiu kun la Roterdama Esperanto-Komitato kun laŭdinda lerteco parabis la prezentadon, alparolis la grandnombran publikon, salutis la

gastojn kaj la ĵurnalistojn kaj donis informojn pri la teatraĵo. Dum la tuta prezentado de la longa teatraĵo regis en la salono silentega atento, fenomeno, pri kiu povas ĵaluzi profesiaj trupoj aktoraj. La recenzistoj de la gazeto estis tre impresitaj de tio, ke la publiko kun kompreno kaj sen enuo povis sekvi la dramon, kaj rigardis tion kiel pruvon pri la perfekta funkcio de Esperanto. La prezentado havis gravan propagandan efikon. La oficiala urba institucio „Roterdama Art-Fondaĵo” publikigis la informojn en la programo de la „Art-Agendo”, legata de 20,000 homoj, kaj pluraj ĵurnaloj raportis en seriozaj kaj favoraj artikoloj.

Esperanto-ekspozicioj en Amsterdam kaj Roterdam. — La loka sekcio de L.E.E.N. en AMSTERDAM aranĝis dum la fino de septembro kaj komenco de oktobro sukcesplenan Esperanto-ekspozicion en la Universitata Biblioteko. La „rector magnificus” de la universitato persone malfermis la ekspozicion kaj varme pledis por Esperanto. Gravaj ĵurnaloj (Parool, Handelsblad, Vrije Volk, Trouw, Nieuws v. d. Dag, Volkskrant) publikigis favorajn raportojn. La ekspozicio estis bone vizitata, precipe de studentoj, kaj helpis varbi novajn kursanojn. — En ROTTERDAM la loka Esperanto-Komitato aranĝos komence de novembro Esperanto-ekspozicion en la baldaŭ inaŭgurota konstruaĵo „Wereldjeugd Societeit”, Haringvliet 90. La esperantistoj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo estas petataj instigi siajn ne-esperantistajn gekonatojn, viziti grandnombre la ekspozicion. Detalajn informojn oni povas ricevi de: f-ino M.C. Diener, sek. de „Mercurio”, Matheneserdijk 238 a. Rotterdam-West, Telefono 39010.

„Kulturaj Vesperoj” en Torino. — La loka grupo de la Itala Esperanto-Federacio aranĝas serion de „Kulturaj Vesperoj” dum la sezono

1953—54, kun prelegoj de eminentaj kompetentuloj pri temoj sciencaj, artaj kaj sociaj. La prelegoj okazos unufoje en la monato, ĉiam lunde, vespere je la 21-a horo en la Palaco „Carignano”, kun libera eniro. Jen la detala programo: **12-X** Prof. Giorgio Canuto, rektoro de la Universitato de Parma; Kial la sango ne estas egala en ĉiuj homoj? — **9-XI** Adv. Ademaro Barbiellini Amidei: Ciutaga justeco. — **14-XII** Adv. Attilio Vaona: Zamenhof, homo kaj ideo. — **11-I** Prof. Mario Guzzi: Evoluo de modernaj lingvoj. — **8-II** Prof. Guglielmo Vasio: Muziko moderna kaj muziko klasika. — **8-III** Prof-ino Clelia Conterno Guglielminetti: Problemoj de nuntempa instruado. — **12-IV** Roberto Codazza: Unuigo de juraj leĝaroj. — **10-V** Giancarlo Fighiera: La doktrino de neperforto de Tolstoj ĝis Gandhi. — **7-VI** D-ro Inĝ. Otello Nanni: Kiel oni utiligas la hidraŭlikajn fortojn. — Ĉiuj prelegoj estas esperantlingvaj.

Nederlanda Radio. — La Nederlanda Radio la 1-an de oktobro ne efektivigis la kutiman jarkvaronan interŝanĝon de la ondlongoj de la stacioj Hilversum I kaj II, pro teknikaj kaŭzoj (riparoj en la instalaĵoj de la sendstacioj), sed prokrastis ĝin ĝis la 1-a de januaro. Tial la elsendoj de VARA (ĉiumerkrede) okazos plue sur la ondlongo 298 m, la elsendoj de KRO (ĉiusabate) kaj de NCRV (de nun lunde, unufoje en la monatoj sur ondlongo 402 m, ĝis la jarfino, kaj post tiam inverse).

Kristana Radio. — La Nederlanda Kristana Radio-Unuiĝo (NCRV), kiu per la stacio Hilversum regule elsendas en Esperanto, faris ŝanĝon en sia programo. La Esperanto-lingvaj elsendoj „La evangelio en Esperanto” okazos de nun lunde (ĝis nun vendrede), unufoje en ĉiu monato, en la ĝis nun kutima horo: 23, 15—23,30 laŭ mezeŭropa tempo. La elsendoj

konsistas el prelego pri kristana temo en muzika kadro, en kiu kunlaboras s-ino Jelly Koopmans-Schotanus per kantado kaj s-ro Meindert Boeke per orgenludo. La elsendoj dum la proksimaj ses monatoj okazos en la tagoj: 26/X (s-ro A. de Smit el Eindhoven sub titolo „Kiel herbo”); 23/XI (s-ro J. Noordhoek el Rotterdam, temo ankoraŭ ne fiksita); 21/XII (s-ro J. U. Hommes el Apeldoorn); 18/I, 15/II kaj 15/III.

Nederlando. — En EINDHOVEN la loka Esperanto-Komitato de la kunlaborantaj esperantistaj unuiĝoj aranĝis en la tagoj 26 kaj 27 de septembro ekspozicion de esperantaj kun klarigado pri la nuna stato de la Esperantomovado. — En ZAANDAM la gazeto „De Typhoon” komencis publikigi denove Esperanto-kurson por komencantoj. La unua leciono aperis en la n-ro de 24 de sept. — En AMSTERDAM okazis Esperanto-ekspozicio en la Universitato. Ĝin malfermis la universitata rektoro mem. S-ro S. Pragano komencis gvidi tri Esperanto-kursojn, du en la Popoluniversitato (por komencantoj kaj progresantoj), unu en la Universitato, kiel docento. — En HAGO s-ro S. Pragano gvidas en la Popoluniversitato Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresantoj. — La Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado” (direktoro: s-ro C. B. Zondervan, Ceintuurbaan 227, Deventer) denove faras enketon pri la instruado de Esperanto en la nederlandaj lernejoj kaj alvokas la lernejojn, ke ili petu la statistikan demandfolion. — En HAGO denove funkcias kursoj de Esperanto (por komencantoj kaj progresantoj) en la Meza Teknika Lernejo, gvidataj de inĝ. J. R. G. Isbrucker, vicdirektoro de la lernejo. En la Supera Burĝa Lernejo en la Beeklaan komenciĝis Esperanto-kurso sub la gvido de s-ro E. Borsboom. Partoprenas 14 gelernantoj de la lernejo.



Legu la konkursajn regulojn en la januara numero!

405-a konkurso.

UNIVERSALA LIGO

Kiel vi vidas, la nomo de nia bone konata organizaĵo konsistas el 14 literoj. La tasko de ĉi tiu konkurso estas: fari el tiuj 14 literoj aliajn vortojn, ekzemple: *salo, veni, universo, ligas* k.t.p.

REGULOJ: 1. La vortoj devas esti kompletaj (radiko kun finaĵo) kaj konsisti el minimume du silaboj.

2. Prefiksoj (ekz-e: *ge*), sufiksoj (ekz-e: *ar*), pronomoj (ekz-e: *ili*), prepozicioj (ekz-e: *sur*) kaj korelativaj vortoj (ekz-e: *iu*) ne estas uzeblaj.

3. Iu litero estas nur tiomfoje uzebla, kiomfoje ĝi troviĝas en la vortoj „Universala Ligo”. Ekzemple la vorto „*gorilo*” ne taŭgas, ĉar ĝi enhavas la literon „o” dufoje.

4. Unu vortradiko estas uzebla nur unufoje. Ekz-e el la vortoj „*vera*” kaj „*vero*” oni rajtas enskribi nur unu formon, sed ne ambaŭ.

5. Oni devas ensendi la vortojn en la formo de listo (unu vorto sub alia), en alfabeto vico.

La formadon de la vortoj faciligas, se oni eltranĉas 14 kartonpecojn, surskribas la 14 literojn kaj poste miksadas kaj ŝanĝadas ilin.

Tiuj konkursantoj, kiuj faris plej multajn vortojn, ricevos, laŭ la multeco de siaj vortoj, aŭ ĉe egalnombreco per lotado, la sekvantaj tri libropremiojn: (1) AKBAR, orienta romano; (2) BARBARAJ PROZAJOJ de Prudenci Bertrana; (3) EL KOMEDIOJ de Gogol kaj Molière, trad. Zamenhof. — La solvoj estos akceptataj ĝis la 15-a de februaro.

Observu la konkursan regularon, por ke via solvo povu partopreni en la premio!

406-a konkurso.

LA JUSTA DIVIDO

Tri esperantistaj naturamikoj: s-ro Aglo, s-ro Burdo kaj s-ro Cigno, dum libertempa ekskurso post longa kaj laciga promeno eniris en restoracion. Dum la manĝado s-ro Aglo diris, ke lia edzino donis al li kvar bananojn por manĝi ilin dum la ekskurso. Li proponis dividi ilin post la manĝo.

— He, — diris s-ro Burdo, — kia hazardo! Mi ricevis kvin bananojn de mia edzino por la sama celo!

— Kaj mi trovis en mia dorsosako ses bananojn, — aldonis s-ro Cigno, — do ni povas nun kunigi ĉiujn kaj dividi ilin egale!

En la momento, kiam la tri samideanoj komencis la dividadon de la bananoj, enpaŝis s-ro Dazipo, malnova amiko de la tri ekskursantoj. Post la reciprokaj salutvortoj, ekvidinte la bananojn, li diris:

— He, ĉu vi havas bananojn? Kia bonŝanco! Mi ĝuste deziregas manĝi bananon. Mi havas proponon: hodiaŭ mi faris bonan komercon; se vi konsentas dividi la bananojn egale inter ni kvar, mi rekompencos vin per partopreno en mia gajno.

— Akceptite! — kriis samtempe la tri ekskursantoj. Ili dividis la bananojn kaj poste s-ro Dazipo metis sur la tablon 15 guldenojn.

S-ro Cigno tiam diris:

— Tio precize trafas! Mi prenos ses guldenojn, s-ro Burdo ricevos kvin guldenojn, kaj la restaj kvar guldenoj apartenos al s-ro Aglo.

S-ro Aglo dum momento pripensis kaj post tio diris:

— Mi opinias, ke vi prenas por vi tro malmulte. Atendu, mi elkalkulos, kiom da mono devos ricevi ĉiu el ni.

S-ro Aglo tiam faris la precizan kalkulon kaj laŭ tio oni ĝuste kaj juste dividis la monon.

La konkursa problemo estas: kiom da mono ricevis ĉiu el la tri ekskursantoj?

Inter la solvintoj estos dislotataj la sekvantaj tri libropremioj: (1) AŬSTRALIO, lando kaj popolo; (2) NATAN LA SAGULO de Lessing; (3) EL LA BIBLIO. — La solvoj estos akceptataj ĝis la 15-a de februaro. Ne forgesu plenumi la konkursajn regulojn!

KONKURSAJ SOLVOJ

395-a konkurso. En ĉi tiu konkurso, publikigita en la numero 183—184 (januaro-februaro 1953) de La Praktiko, partoprenis 97 personoj. El ili 96 bone solvis la literan enigmon kaj trovis la titolon de la interesa nova libro: **LA ALIA PASINTECO**. — La tri libropremiojn gajnis per lotado la sekvantaj konkursintoj: (1) S-ro **Wilfred M. Goodes** en Hornchurch, Essex, Anglujo; (2) S-ro **Ivor Williams** en Belfast, Nord-Irlando; (3) S-ro **C. S. Davis** en Londono, Anglujo. La premioj estas dissendataj samtempe kun ĉi tiu numero de La Praktiko. — Unu konkursanto donis malbonan solvon („Baali al Gsintero“) kaj tial ne partoprenis en la premiado.

396-a konkurso. En ĉi tiu konkurso, publikigita en la numero 183—184 (januaro-februaro 1953) de La Praktiko, partoprenis 91 personoj. El ili 87 bone solvis la kruc-vort-enigmon. Jen la ĝusta solvo:

D A N U J O P U N K T O
 T N I U R
 V E R G O O P I N I A S
 I O L R N
 A S O M E V O M E S O
 T B D U
 K O M O O V O F I N O
 R N O A
 V E K I R A D O O R O
 Z U O R C
 K O L B A S O F O L I O
 K U T K S
 M O T O R O K R O N O J

Por horizontala 1 ni akceptis kiel bonan ankaŭ la vorton LAPUJO (= Laplando), sed la vorto SOFORO por horizontala 27 ne estis akceptebla. — La tri libropremiojn la lotado havigis al la sekvantaj tri konkursantoj: (1) S-ro **Helge Norén** en Angelholm, Svedujo; (2) S-ro **Arthur George Wiltshire** en Auckland, Nov-Zelando; (3) S-ro **Mariano de la Iglesia** en Madrid, Hispanujo. La premioj iras al ili samtempe kun ĉi tiu numero de La Praktiko. — La solvoj de 4 konkursantoj enhavis erarajn kaj tial ili ne povis partopreni en la premiado.

La partoprenantoj de la konkursoj bonvolu en sia propra intereso nepre plenumi la konkursajn regulojn, ĉar la nekonformaj solvoj restas ekster la konkursoj!

Bela libro por infanoj:




MIRAKLAJ AVENTUROJ DE SINJORO LONGKRURULO

Kun 152 bildoj kaj 162 strofoj
 rime verkitaj de Dreves Uitterdijk L.K.
 75 paĝoj. — Formato 26 × 18 cm.

Prezo 5.— Steloj, sendkosto —.60 St.

Vendata ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.



La multe laŭdata, plej sukcesa romano de la konata nederlanda verkisto **RICO BULTHUIS** (AM de UL 1672), filo de la Esperantopioniro kaj verkisto H. J. Bulthuis.

La aŭtoro rakontas la historion de viro, kiu perdis la memoron. En instituto por nervmalsanuloj li iom post iom malkovras sian misteran kaj timigan pasintecon kaj komprenas la kaŭzojn de sia interna forkuro en la memor-perdon.

Tradukis:
JULIA ISBRUCKER

Duontole bindita, kun kolorpresita kovrilo. 292 paĝoj.
 Formato 14 × 20 cm.

Prezo 19.60 Steloj, sendkosto 1,— Stelo. — Al Aktivaj Membroj de UL rabato de 10 % ĉe antaŭpago.

Elonita de la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando. — Vendata ĉe ĉiu esperantista librejo kaj libroservo.

La konata nervkuracisto kaj parapsikologo **D-ro Paul Dietz** en Hago skribis pri ĉi tiu libro:

„El la vidpunktoj de la medicino kaj psikologio LA ALIA PASINTECO baziĝas sur realaj okazintaĵoj. La aŭtoro konsultis ekspertojn, por resti kiel eble plej multe sur la tereno de la realeco. Ĉi tiu romano posedas la streĉon de detektiva romano, kaj tamen ĝi ne estas supraĵa aŭ sensaciema, kaj, kio ankoraŭ pli gravas: la fino estas logika kaj... surpriza!“

El recenzoj en la nederlanda gazetaro:

„Per ĉi tiu libro Rico Bulthuis akiris lokon inter la malmultaj multpromesaj verkistoj de sia generacio.“ — *Haagsche Courant*.

„La plej bona libro de la monato.“ — *De Linie*.

„Psikologia vivpriskribo, tre lerte kaj vere kompetente verkita.“ — *Reveille*.

„Majstre verkita libro.“ — *Algemeen Dagblad*.

„La streĉo daŭras ĝis la fino. Kiu komencis legi ĝin, ne povas ĉesi. En ĉi tiu libro kuniĝas la bonaj ecoj de detektiva rakonto kun la bonaj ecoj de profunda psikologia romano, kaj tial ĝi estas plene sukcesinta.“ — *Ontmoeting*.

El recenzoj en la Esperanta gazetaro:

„Ĉi tiu romano streĉas la atenton de la unua ĝis la lasta paĝo. La traduko estas tre bona kaj flua. Resume: romano interesa, lerte tradukita, bone presita, fortike bindita, mulmultekosta kaj tre rekomendinda.“ — *Heroldo de Esperanto*.

„Tiel interesa mi trovis la enhavon, ke mi ne volis formeti la libron, ĝis mi estis leginta la lastan paĝon. Sed tio atestas ankaŭ la altan nivelon de la traduko. La libro estas bone presita kaj bindita kun alloga ekstero. Ĝi estas ĉiel rekomendinda.“

Esperanto.

„La traduko estas meritplena, des pli, ke la verko enhavas multajn malfacilajn terminojn, kaj esprimas sentojn, animstatojn kaj psikologiajn situaciojn, kies esperantigo postulis planan majstrecon de la lingvo. Ĉi tiu libro meritas okupi honoran lokon en la libroŝrankoj de la esperantistoj.“ — *Franca Esperantisto*.

„La verko havas sendube altan literaturan valoron. Ĝi apartenas al tiuj maloftaj libroj, kiuj kontentigas ĉiuspecajn legantojn. La korekta, agrabla traduko fidele peras la pensojn de la aŭtoro.“ — *Svenska Esperanto-Tidningen*.

PANORAMO

Laciga flugveturo. — En la informilo de la nederlanda flugvetura entrepreno K.L.M. ni legas interesan rakonteton pri la 75-jara s-ro M. S. el la urbo Apeldoorn, kiu post longa hezitado fine decidis elprovi la veturon en la aero, kaj faris mallongan rondflugon super la nederlanda ĉefurbo Amsterdamo. Post la surteriĝo de la flugmaŝino la maljunulo, kompreneble, fariĝis la centro de interesiĝo. Interalie iu demandis lin, ĉu li ne timis dum la flugo? „Tio, tion ne,” — respondis la maljuna kuraĝulo, — „sed mi treege laciĝis, ĉar, por esti sincera, mi ne kuraĝis sidi en la seĝo kun mia tuta pezo!”

Kiel oni adiaŭas. — Anne Morrow Lindbergh skribas en sia libro „Norden al la Oriento” pri la maniero, en kiu diversaj popoloj esprimas sin ĉe la disiĝo. La francoj diras: „Ĝis revido”, eĉ se ili scias, ke ili neniam plu revidos unu la alian. La germanoj kaj nederlandanoj diras same. Ili trompas unu la alian, nur por kvazaŭ mildigi la doloron de la disiĝo. La angloj diras: „Good bye”. Tio verdire estas preĝo. Ĝi signifas: mi bedaŭras, ke vi foriras

kaj ke ni ne estos plu kune, sed mi petas Dion, ke li estu kun vi kaj ne lasu vin sola. La plej interesan esprimon la verkistino trovis en Japanujo. La japanoj diras ĉe la adiaŭo: „Sajonara”, kio signifas: se tamen ne povas esti alie! Ĝi estas la simpla akcepto de tio, kio ne estas evitebla kaj ŝanĝebla, kaj tamen ĝi montras la bedaŭron de la disiĝo.

Vortdifino. — Jen kiel difinis iu la vorton „opero”: Kazo, kiam iu heroo estas mortpikata en la dorso, kaj anstataŭ agoni kaj elsangi, li komencas kanti.

Genia komercmetodo. — Iu fabrikanto en Parizo skribis al unu el siaj klientoj: „Mi proponas al vi belegan ŝtofon; la prezo estas 500 frankoj por unu metro. Mi aldonas specimenon. En la kazo, ke mi ne ricevos de vi respondon dum ok tagoj, mi konkludos, ke vi ne volas pagi pli ol 450 frankojn por la metro. Por ne perdi tempon, mi akceptos la lastnomitan prezon.”

Efika reklamo. — En la montra fenestro de bakista butikio pendis karto kun la sekvantaj vortoj: „Tortoj, kiajn via

patrino ĉiam bakis: prezo po 2,— guldenoj. — Tortoj, kiajn via patrino pensis baki: prezo po 3,— guldenoj.”

Konsilo de centjarulo. — S-ro Charles Eisenberg, gladisto en unu novjorka lavejo, ĵus festis sian centan naskiĝtagon. Je la peto de siaj admirantoj kaj enivantoj li donis la sekvantan recepton por atingi la cent jarojn: „Forte laboregi, ne fumi, kaj da brando trinki nur unu glason.” Sed li nenion diris pri la ofteco de tiu unu glaso.

Stranga misjuĝo. — Unu sesjara knabeto venis en unu taĝo hejmen el la lernejo, kun letereto de sia instruistino por la gepatroj. En la letereto estis la konsilo al la gepatroj, ke ili kiel eble plej baldaŭ elprenu la infanon el la lernejo, ĉar li estas senespere stulta kaj nenion povas lerni. La nomo de tiu knabeto estis: Thomas Alva Edison, kiu poste donacis al la mondo la elektran lampon, la fonografon, la parolantan filmon kaj ankoraŭ mil aliajn admirindajn eltrovaĵojn.

Pezoŝanĝiĝo. — Kaŭze de la centrifuga forto pro la turniĝado de la terĝlobo, la homo, irante de oriento al okcidento, havas pli grandan pezon, ol dum la irado de okcidento al oriento. Ĉi tiu informo povos doni iom da espero al tiuj personoj, kiuj ĝis nun vane klopodadis liberiĝi de siaj troaj gramoj. Ili povas nun elprovi ankaŭ ĉi tiun metodon.

Teorio kaj praktiko. — „En ĉi tiu domo ni rigardas unu la alian kiel membrojn de unu granda familio”, legas la gastoj de la hotelo „Victoria” en la angla marborda banurbo Blackpool. Sed sub tiu tabulo pendas malgranda karto kun la vortoj: „La direkcio ne prenas respondecon pri malapero de valoraj objektoj el la ĉambroj.”

Edziniĝemo en Usono. — Laŭ la statistikoj pri la popolo de Usono, la amerikaj virinoj pli kaj pli diligente edziniĝadas. En la jaro 1890 la nombro de la fraŭlinoj estis 34 procentoj de ĉiuj maturaj virinoj, en 1940 nur 28 % kaj en la jaro 1952 jam nur 19 procentoj. Se la progreso tiel daŭros, post ne multaj jaroj ne ekzistos en Usono eĉ unu fraŭlino, kaj la vorton „miss” oni povos forstrecki en la vortaro.

Kiel fariĝi ŝatata? — Dum festeno honore al diversaj konataj sportistoj, ĉi tiuj sentis sin devigataj paroli kelkajn vortojn. Unu post la alia prenis la parolon, kaj la ĉeestantoj jam komencis tediĝi, ĉar ĉiu parolis tro longe. Fine la parolvico venis al la fama tenisludantino Helen Wills. Ŝi ekstaris kaj diris nur la sekvantajn vortojn: „Por esti vidata, oni devas ekstarigi; por esti aŭdata, oni devas klare paroli. Sed por esti ŝatata, oni devas resti sur la seĝo!” Tondra aplaŭdo pruvis, ke ŝi gajnis la simpation de la tuta ĉeestantaro.




KONCERTA KANTARO

Unuarange presita bela libro grandformata (21 × 28 cm.), entenanta la Esperanto-lingvajn tekstojn kaj la muziknotojn por fortepiano de 38 tre ŝatataj kantoj de Schubert, Giordani, Beethoven, Haydn, Mozart, Mendelssohn, Cornelius, Schumann, Franz, Löwe, Reissiger, v. Woyna, Bérat, Martini, Verhuls, Theodotus. — 80 paĝoj.

Broŝurita, kun desegnita kovrilo .. 11 Steloj, sendkosto 1 Stelo.

Vendata ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

la mondo ridas



En la ĉapelbutiko.

Vendistino: Sinjorino, jam ĉi tiu plumeto sur la ĉapelo faras vin dek jarojn pli juna.

Aĉetantino: Bone, mi prenas ĝin; sed bonvolu almeti ankoraŭ du tiajn plumetojn!

(Point de Vue)

Sur la marbordo.

Policano, al juna knabino: Fi, kion dirus via patrino, se ŝi ekvidus vin en ĉi tiu maldeca banvesteto!

Knabino: Ŝi certe estus furioza, ĉar ĝi apartenas al ŝi!

(Eva)

Prava kolero.

Edzino kolera: Ĉu vi fine venas hejmen? La manĝo estas jam de du horoj sur la tablo!

Edzo: Mi tre bedaŭras, karulino, sed unu granda ŝarĝaŭto renversis mian aŭton.

Edzino: Sed tio tamen ne daŭras du horojn!

(Picture Post)

En juĝejo.

Juĝisto: La policisto diris, ke vi estis ebria kaj grimpis sur lanternon.

— Sinjoro juĝisto, — respondas la viro, — estas vere, ke mi grimpis sur la lanternon, sed mi ne estis ebria. Kvin grandaj krokodiloj jam dum duona horo persekutis min, kaj tiu lanterno estis la sola rifuĝejo, kiun mi povis trovi.

(Uitkijk)

En birdobutiko.

Vendisto: Ne, sinjorino, ĉi tiu papago ne povas paroli, sed vi havos tamen multan plezuron de ĝi; ĝi estas bonega aŭskultanto!

(Goed Nieuws)

Inter virinoj.

Aŭdu, hieraŭ Erik petis min fariĝi lia edzino.

— Ĉu vere? Kaj ĉu vi ne trovas ke li tre ĉarme faras tion?

(Panorama)

Urbaj vidindaĵoj.

Iu kamparano iris foje kun sia edzino en la teatron, dum vizito al la ĉefurbo de la provinco. Oni prezentis streĉan dramon, kiu finiĝis per la morto de la heroo.

Subite la kamparano turnas sin al sia edzino kun la vortoj:

— Ni restu ankoraŭ kelkajn tagojn en la urbo, karulino; mi volas vidi la enterigon de tiu granda heroo.

(Journal)

Gentila invito.

La vojo en la Alpoj fariĝis ĉiam pli kruta. Fine la aŭtobuso haltis. La kondukto eliras kaj diras:

— Gesinjoroj, la lasta parto de ĉi tiu vojo estas irebla nur por azenoj kaj muloj. Mi do petas vin daŭrigi piede!

(Wiener Magazin)

Geedzeco.

La edzo eksidis en komforta seĝo kaj komencis legi sian gazeton. Post longa tempo de silento la edzino diris:

— Mi vizitis hodiaŭ la kuraĉiston.

La edzo daŭrigis la legadon, sed fine respondis:

— Ĉu vere? Kaj kiel li fartis?

(Readers Digest)

Amerikanismo.

Unu filmaktoro en Hollywood aŭdis, ke ŝia antaŭa edzo edzinigis alian filmaktorinon. Tuj ŝi sendis al sia koleginino siajn antaŭajn vizitkartojn kun letereto:

„Mi sendas ilin eksprese; ĉar mi timas, ke vi alie ne plu povos uzi ilin.”

(Picture Post)

Sensperteco.

Kuracisto: Jen, sinjoro, prenu ĉi tiujn gutojn antaŭ la enlitiĝo, kaj vi dormos kiel ĵus naskita infano.

Paciento: Mi vidas, sinjoro doktoro, ke vi neniam havis en via hejmo ĵus naskitan infanon!

(Neue Illustrierte)

Rasmikso.

Iu turisto en Alasko vidis la unuajn eskimojn. Kun miro li rimarkis, ke unu virino, kiu aspektis kiel plensanga eskimino, portis sur sia dorso infaneton, kiu estis blonda kaj bluokula. Li demandis:

— Ĉu via infano estas plensanga eskimo?

— Duona, — respondis la virino.

— Ĉu duonirlanda? Duon-skota? Aŭ duonkia?

— Duon-bordgardista, — diris la patrino.

(Humorist)

Pensdiveno.

Maljuna geedza paro el la kamparo por la unua fojo vizitis la grandan urbon. Evidente la maljuna farmisto pli multe interesiĝis pri la grandurbaj videblajoj, ol lia edzino. Fine ŝi ekkriis:

— Johano, la maniero, en kiu vi rigardas tiujn urbajn virinojn, estas vere skandala. Oni pensos, ke vi ankoraŭ neniam vidis virinajn krurojn!

— Ĝuste tio estas, kion mi pensis, — respondis li medite.

(Piccolo)

Moderna scienco.

Du psikiatroj, enprofundiĝinte en interesa diskuto, iris al la lifto. La liftknabo salutas ilin per:

— Bonan matenon!

La scienculoj konfuzite rigardas unu la alian, kaj fine unu el ili mirigite demandas:

— Kion verdire povis tiu knabo intenci per tiuj vortoj?

(College Life)

En pikniko.

Ŝi: Kaj ĉion mi mem preparis, karulo!

Li: Tute ne gravas, kara edzino; en la libera naturo ĉio bongustas!

(Punch)

Inter amikinoj.

— La amo estas kiel Sankta Nikolao. Mi ne plu kredas en ĝi, de kiam mi ne plu ricevas donacojn!

(Margriet)

Inter amikoj.

— Karlo edziĝis al tute moderna junulino. Ŝi ŝoforas, ŝi naĝas, ŝi golfludas, ŝi rajdas kaj ŝi eĉ havas flugdiplomon!

— Kia felico, ke li bone povas kuiri!

(Woman and Home)

KALENDARO POR LA JARO 1954

	JANUARO	FEBRUARO	MARTO
Lundo	4 11 18 25	8 15 22	1 8 15 22 29
Mardo	5 12 19 26	9 16 23	2 9 16 23 30
Merkredo ..	6 13 20 27	3 10 17 24	3 10 17 24 31
Ĵaŭdo	7 14 21 28	4 11 18 25	4 11 18 25
Vendredo ..	1 8 15 22 29	5 12 19 26	5 12 19 26
Sabato	2 9 16 23 30	6 13 20 27	6 13 20 27
Dimanĉo ..	3 10 17 24 31	7 14 21 28	7 14 21 28
	APRILIO	MAJO	JUNIO
Lundo	5 12 19 26	3 10 17 24 31	7 14 21 28
Mardo	6 13 20 27	4 11 18 25	1 8 15 22 29
Merkredo ..	7 14 21 28	5 12 19 26	2 9 16 23 30
Ĵaŭdo	1 8 15 22 29	6 13 20 27	3 10 17 24
Vendredo ..	2 9 16 23 30	7 14 21 28	4 11 18 25
Sabato	3 10 17 24 31	1 8 15 22 29	5 12 19 26
Dimanĉo ..	4 11 18 25	2 9 16 23 30	6 13 20 27
	JULIO	AŬGUSTO	SEPTEMBRO
Lundo	5 12 19 26	2 9 16 23 30	6 13 20 27
Mardo	6 13 20 27	3 10 17 24 31	7 14 21 28
Merkredo ..	7 14 21 28	4 11 18 25	1 8 15 22 29
Ĵaŭdo	1 8 15 22 29	5 12 19 26	2 9 16 23 30
Vendredo ..	2 9 16 23 30	6 13 20 27	3 10 17 24
Sabato	3 10 17 24 31	7 14 21 28	4 11 18 25
Dimanĉo ..	4 11 18 25	1 8 15 22 29	5 12 19 26
	OKTOBRO	NOVEMBRO	DECEMBRO
Lundo	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27
Mardo	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28
Merkredo ..	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29
Ĵaŭdo	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30
Vendredo ..	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31
Sabato	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25
Dimanĉo ..	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26

Pasko 18 Aprilo

Pentekosto 6 Junio

Kristnasko 25 Decembro

D-ro L. L. Zamenhof vivis de

la 15 Dec. 1859 ĝis la 14 Apr.

1917. Esperanto aperis en 1887.

Ĉi tiu kalendaro, presita kiel poŝtkarto en verda kaj ruĝa koloroj sur bonkvalita blanka kartono, estas vendata ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago. — 10 ekz-oj kostas 3. — Stelojn.

NOVAJ LIBROJ

La recenzitaj libroj kaj ĉiuj aliaj esp-aj libroj estas acetebblaj ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

Max Butin: WIE SAGE ICH'S AUF ESPERANTO? 100 paĝoj. Formato 12 × 17 cm. Prezo 2.— g. markoj. Eldonejo Siegfried Ziegler, Engelbertstrasse 7, München-Pasing, Germanujo. — Ĉi tiu valora studlibro por germanaj esperantistoj konsistas el listo de esprimoj, proverboj k.t.p. en germana lingvo, kun iliaj tradukoj aŭ ekvivalentoj en Esperanto. La aŭtoro, eminenta kompetentulo en Esperanto, insistas por funda lernado kaj perfekta uzado de nia lingvo kaj kondamnas la kontentiĝon de multaj esperantistoj por lingvoscio nur por la plej simplaj bezonoj. Lia verketo, aranĝita en alfabeto vico de la tradukitaj vortoj, grave helpas la germanlingvajn esperantistojn por atingi la celon: regi la lingvon.

J. H. Sullivan: LA JUNAJ DETEKTIVOJ. Kun ilustraĵoj de Brenda Goodwin. 43 paĝoj. Formato 12 × 18 cm. Prezo 2 ŝilingoj. Eldonis: The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo. — La aŭtoro verkis ĉi tiun libreton speciale por geknaboj, kiuj lernas Esperanton, por havigi al ili facilajn kaj interesan legadon, ĉar li spertis, ke en tiu aĝo (13—14 jaroj) preskaŭ ĉiu preferas legi pri aventuroj ol pri kulturaj temoj. Efektive, la ĝisnuna literaturo de Esperanto ne estas riĉa en taŭgaj legaĵoj por geknaboj, kaj tial ĉi tiu libreto kun sia rakonto pri kontrabandistoj estas tre bonvena kiel distra kaj ekzerca legaĵo.

D-ro J. Székely: PROPAGANDO DE ESPERANTO. 26 paĝoj. Formato 14 × 21 cm. Prezo 1.25 guld. (5 Steloj). Eldonis: Esperanto Film-Grupo, Antwerpsestraat 45, Bergen-op-Zoom, Nederlando. — La libreto entenas propagandoplanon prezentitan kaj aprobitan en la 32-a Universala Kongreso de Esperanto en Bern. La aŭtoro donas detale ellaboritajn proponojn pri reklamo, organizo, statistiko, gazetaro, instruado k.t.p. kun la deziro, ke la esperantistaj kluboj preparolu la sugestojn kaj klopodu ilin efektiviĝi.

G. J. Degenkamp: LA KONSILANTO pri la Esperanta gramatiko. Dua tute reviziita eldono. 105 paĝoj. Formato 13½ × 21½ cm. Kartonita. Prezo 2.75 guld. (11 Steloj). Eldonis: Asocio de Laboristaj Esperantistoj, Heemstedestraat 44, Amsterdam-W. — Ĉi tiu utiliga studlibro klarigas en la nederlanda lingvo preskaŭ ĉiujn lingvajn problemojn, kiujn oni renkontas dum la studado de Esperanto. La aŭtoro donas siajn klarigojn kaj konsilojn apogante sin je siaj multjaraj spertoj en la instruado de Esperanto kaj post zorga konsidero de la opinioj de aliaj esperantologoj, en liberala spirito de konsilanto, kaj ne de leĝdonanto. La libro estas sendube necesa helpilo por ĉiu nederlandano, kiu volas perfektigi sin en Esperanto. Pro la gravaj ŝanĝoj en la tekstoj ankaŭ la posedantoj de la unua eldono bezonas ĉi tiun novan eldonon.

A. M. D. Korff: SNEL ESPERANTO LEREN. Woordenboek. Kanarie-boekje No. 229. 64 paĝoj. Formato 8½ × 12½ cm. Prezo .50 guld. (2 Steloj). Eldonejo „Success“, Prinsevinkepark 2, Den Haag, Nederlando. — Daŭrigo de la Esperanto-gramatiko jam aperinta sub n-ro 227 en en ĉi tiu bela kaj tre populara libroserio. Krom konciza vortaro Esp.-Nederlanda kaj Ned.-Esp. la libreto enhavas specialajn listojn de pronomoj, tagoj, monatoj, numeraloj, manĝaĵoj, trinkaĵoj, liston de mallongigoj, tabelon de la korelativoj kaj kolekton de proverboj.

Martinus: LA HOMARO KAJ LA MOND-BILDO. El la dana originalo „Menneskeheden og Verdensbilledet“ tradukis C. Graversen. 124 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. En verda tolbando kun ora stampo. Prezo 6.50 d. kr. Eldonis: Esperanto-Sekcio de la Spirit-Scienca Instituto de Martinus, Kopenhago, Danujo. — Ĉi tiu bela libreto prezentas al ni la instruon de la inter-

nacie famkonata spirita gvidanto Martinus en Danujo, resumante la enhavon de lia 3000-paĝa ĉefverko „Livets Bog“ (La libro de l'vivo). Laŭ Martinus la mondo nuntempe troviĝas en grava krizo pro la materiisma sinteno de la regantoj kaj scienculoj, kaj la vojo de la eliro konsistas en la intelekta kompreno kaj agnosko de la veraĵoj, kiujn siatepe proklamis kaj instruis Jesuo, Budho, Mahometo kaj ĉiuj grandaj saĝuloj de la historio. Li akcentas, ke ne sufiĉas nur kredi la anoncigitajn veraĵojn, sed per spirit-scienca klarigo de la vivfenomenoj oni devas veni al la solvo de la vivmisteroj, kio ebligas konduki la homaron al daŭra paco. En la 69 ĉapitroj de la libro Martinus klarigas la fundamenton de sia spirit-scienca kaj enkondukas la leganton en la profundajn pensojn pri religio, politiko, moralo, vivo, morto, malsano, kosmo kaj eterneco. La ideoj de Martinus ravis kaj entuziasmigis milojn da homoj kaj kreis vastan movadon, en kiu nun estas ankaŭ Esperanto-sekcio, fondita de kelkaj sindonaj esperantistoj danaj. Al ilia laboro kaj ofero ni dankas la publikigon de ĉi tiu altvalora, tre instrua kaj konsola libro, aperanta en modele perfekta Esperanto. Al la libro belan antaŭparolon skribis la fama scienculo D-ro Paul Brunton.

RADIO

PROGRAMO DE ESPERANTO-LINGVAJ ELSENDOJ

La horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo. Landoj kun orienteŭropa tempo aldonu unu horon. Landoj kun okcidenteŭropa tempo deprenu unu horon.

REGULAJ ELSENDOJ

Lunde:

22,35—22,40 **Wien** 25.46, 48.74 kaj 513 m. — Informoj.

23,15—23,30 **Hilversum**. (NCRV) dum X—XII 402 m, dum I—III 298 m. — „La evangelio en Esperanto“. Parolado pri kristana temo, nur unufoje en ĉiu monato (26/X, 23/XI, 21/XII, 18/I, 15/II, 15/III).

Mardo:

12,55—13,00 **Bern** 31.46, 48.66, por Afriko 16.87 m. — Parolado de D-ro A. Baur.

16,00—16,15 **Wien** 25, 30, 41, 48 kaj 203 m. — Prelego, en ĉiu dua mardo.

18,35—18,40 **Bern** 31.46, 48.66, por Afriko 19.60 m. — Kiel en la tagmezo.

Merkredo:

16,45—17,00 **Graz** 417 m. — Kurso, en ĉiu dua merkredo.

19,00—19,20 **Roma** 25.21, 31.35 kaj 49.92 m. — Varia progr., aparte publikigata.

20,30—21,00 **Madrid** 42.33 kaj 225 m. — Prelego kaj informoj, esp-e kaj hisp.

22,45—23,15 **Valencia** 43 m. — Prelegoj.

23,15—23,20 **Hilversum** (VARA) dum X—XII 298 m, dum I—III 402 m. Socialistaj novaĵoj.

Ĵaŭde:

08,40—08,45 **Lille** 218 m. — Informoj.

09,30—09,45 **Paris** 348 m. — Kurso de P. Delaire.

12,55—13,00 **Bern** 31.46, 48.66, por Afriko 16.87 m. — Parolado de Prof. D-ro Edmond Privat, prez. de UL, pri mondfederacio kaj mondopaco.

18,35—18,40 **Bern** 31.46, 48.66, por Afriko 19.60 m. — Kiel en la tagmezo.

24,05—24,20 **Zagreb** 265 m. — Informoj.

Vendrede:

19,00—19,20 **Roma**. — Kiel merkredo.

Sabate:

09,30—10,00 **Rio de Janeiro** 30.71 kaj 375 m. — Kurso kaj informoj.

23,15—23,20 **Hilversum** (KRO) dum X—XII 402 m, dum I—III 298 m. Katolikaj informoj.

LA GAZETARO

KAJ LA MONDLINGVO

Menciataj estas nacilingvaj gazetonumeroj, kiujn la redakcio ricevis.

Vrij Nederland, 8-VIII-53 (Amsterdam, Nederlando). — Sur paĝo 8 artikolo titolita „De bonte wereld“ (La multkolora mondo) de Maurits Dekker, aŭtoro de la teatraĵo „La mondo ne havas atendejon“. Li kritikis la nunan staton de la internacia kunlaboro pro la manko de komuna lingvo, laŭdas kaj rekomendas Esperanton.

Haagsche Courant, 17-VII-53 (Hago, Nederlando). — Sur paĝo 19 konciza raporto sub titolo „Esperantistoj fermis sian laborsezono“ pri la kunveno de la LEEN-sekcio en Hago la 16-an de julio.

Katholischer Digest, X-49 (Aschaffenburg, Germanujo). — Sur paĝo 7-9 ilustrita artikolo titolita „Der Christus der Anden“, traduko de la artikolo „La Kristo de la Andoj“ el n-ro XII-48 de La Praktiko.

De Bussumsche Courant, 25-VI-53 (Bussum, Nederlando). — Sur paĝo 1 bildo kun teksto pri la ekzameno de la partoprenintoj en la Esperanto-kurso publikigita en la gazeto. — En n-ro de 30-VI-53 sur paĝo 1 granda artikolo raportanta pri la rezulto de la ekzamenoj kaj pri la kursfina festo.

República, 3-VI-53 (taga, Lisbono, Portugalujo). — Sur paĝo 5 duonpaĝa artikolo „O Esperanto de novo na berlinda“ de Prof. Edmond Privat pri la decido de UNESKO pri la Esperanto-petskribo kaj la mondlingva problemo nuntempe.

Helmondse Courant (Helmond, Nederlando), 3-III-49. — Informo pri la instruado de Esperanto en Sud-Koreo, artikolo pri la influo de la angla lingvo al la nederlanda.

Haagsch Dagblad, 15-VI (Hago, Nederlando). — Artikolo pri la esperantista geedziĝo de s-ro Magnusson el Islando kaj f-ino Leusink el Nederlando.

Die Reise, XI-52 (Zürich, Svislando). — Sur paĝoj 323-324 ĉefartikolo titolita „Esperanto parolata“, varme pledanta por la enkonduko de Esperanto kiel internacia lingvo. Sur paĝo 349 reklamo de skriba Esperanto-kurso.

ANONCETOJ

TARIFO:

1 vorto aŭ mallongigo 0.20 St.

MONTRU NIAN ADRESON al personoj, kiuj deziras partopreni en Skriba Esperanta E-kurso. (Nur por nederland-lingvanoj.) Petu prospekton! — Adreso: Esperanto-School, Abelestraat 54, Hengelo (O.), Nederlando.

En RAPALLO (Italujo) familia pensioneto por gesamideanoj. Skribu al: S-ino BECATTINI, Casella Postale 22, Rapallo.

SERCATAJ ESTAS ekzempleroj de la sekvantaj libroj: (1) PASO POST PASO, Unua Parto, de Minke & Boom; (2) LINGVAJ RESPONDOJ de D-ro Zamenhof; (3) ESPERANTO-WOORDENSCHAT de Bulthuis & Dominicus; (4) LA HOMA LINGVO de Collinson; (5) BONHUMORAĴ RAKONTOJ de Korczak. — Ankaŭ uzitaj aŭ difektaj ekzempleroj. Proponojn oni bonvolu sendi al: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

NEDERLANDA ESPERANTISTINO serĉas lokon ĉe esperantistoj, prefere en la suda parto de Eŭropo, kiel oficistino, infangardistino k.t.p. La proponojn oni sendu al la redakcio de La Praktiko sub devizo: „Nederlandanino“.